

eLIBRO

Oliver Goldsmith

*Ŝi humiliĝas
por venki*

I N K O



Oliver Goldsmith
ŜI HUMILIĜAS POR VENKI
(She stoops to conquer)

Komedio en kvin aktoj
El la angla tradukis A. Motteau
Lingve reviziita en 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-194-1

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

APRILLO 2003

ENKONDUKO

Tiu ĉi komedio estas la verko, kiu plej efike starigas la famon de Olivero Goldsmith kiel dramverkisto.

Ĝia unua prezento okazis la 25-an de Marto 1773 en la teatro Covent Garden, kie oni akceptis ĝin per aplaŭda entuziasmo, kiu forigis ĉian kontraŭstaron, kaj ĉiu-vespere daŭris ĝis la fino de la sezono.

La ĉefa ideo, ĉirkaŭ kiu turniĝas la tuta agado, rilatas al la eraro pensi, ke la domego de sinjoro Hardcastle nur estas kampara gastejo. Tiu ideo prezentiĝis al Goldsmith per memoro je trompŝerco, kiun petolulo de Ardagh faris por lin moki, kiam li nur estis deksesjara. La ŝerculo montris al li la domegon de bienhava sinjoro Featherstone, kiel domon vilaĝa gastejo!

Goldsmith tien iris, kaj oni kuraĝigis lian eraron tiel, ke la junulo ne ĝin eltrovis antaŭ la nokto.

La agado estas plena de tre ridindaj spritaĵoj, miksitaj kun sentimentalaj partoj. Tony Lumpkin estas persono siaspeca, kies nura nomo sufiĉas por ridigi ĉiujn angle-parolantojn; la maljuna Hardcastle ankaŭ estas strangulo, kaj la malsaĝaĵoj de lia edzino plenigas la komikan anaron.

D-ro Samuel Johnson diris: "Mi ne konas alian kome-
dion, kiu pli prave atingas la celon de bona komedio,
nome, gajigi la aŭskultantaron."

A.M.

PERSONOJ

Sir Charles Marlow
juna Marlow, filo de Sir Charles
sinjoro Hardcastle
Hastings, amiko de juna Marlow
Tony Lumpkin
Diggory, laboristo
sinjorino Hardcastle
fraŭlino Hardcastle
fraŭlino Neville
servistino, trinkejstro, gastoj, servistoj,
k.t.p.

UNUA AKTO

SCENO 1

Ĉambro en malnova kampara domego.

(Venas gesinjoroj Hardcastle)

S-INO HARDCASTLE Mi certigas, sinjoro Hardcastle, ke vi estas strangegega. Ĉu estas, krom ni mem, eĉ unu kreito en la tuta lando, kiu ne veturas al la urbo iafoje por iomete defroti la kamprustajon! Mi vidas, ke la du fraŭlinoj Hoggs, kaj nia najbarino, sinjorino Grigsby, iras tien ĉiuvintre por ricevi monatmezuron da poluro. . . .

S-RO HARDCASTLE Jes, kaj reen ili alportas da vantaĵoj kaj afektemo sufiĉe por la daŭro de la tuta jaro. Mi miregas, ke Londono ne povas dome deteni sian propran malspritaron. En mia tempo, la urbaj sensencaĵoj malfrue rampis ĝis nin, sed nun ili veturas multe pli rapide ol publika veturilo. Vantaĵoj; ne nur venas al ni kiel privataj veturantoj, sed eĉ en korbego kiel pakaĵo.

S-INO HARDCASTLE Jes, via tempo estis/(i»n<i tempo, vere: vi paroladis pri ĝi dum multaj jaroj. Tie ĉi ni loĝas en malnova tremema domo, kiu tute similas al gastejo, krom ke ni neniam vidas iun. Niaj plej altrangaj vizitantoj estas la maljuna sinjorino Oddfish, la vikariedzino, kaj malgranda Kripligato la lama dancinstruisto, kaj nia sola amuzaĵo konsistas el viaj antikvaj diroj pri Princo Eŭgeno kaj la Duko de Marlborough. Mi malŝatas tian naivegan malnovaĵon.

S-RO HARDCASTLE Sed mi tre amas ĝin. Ĉion, kio estas malnova, mi amas: maljunajn amikojn, malnovan tempon, malnovajn kutimojn, malnovajn librojn, malnovan vinon; kaj mi pensas, Doroteo (*li prenas ŝian manon*), ke vi permesos al mi diri, ke mi amis, kaj amas la maljunan edzinon.

S-INO HARDCASTLE Hontu, sinjoro Hardcastle; vi ĉiam parolas pri viaj Doroteoj kaj maljunaj edzinoj. Nomu vin maljunulo se tion vi ŝatas, sed mi ne volas fariĝi maljunulino por vin amuzi. Mi ne estas tiel maljuna kiel vi kalkulas; almenaŭ unu plenjaron vi devas forkalkuli. Aldonu dudek al dudek, kaj vidu la sumon.

- S-RO HARDCASTLE** Mi tuj vidu: dudek kaj dudek estas kvindek sep, akurate.
- S-INO HARDCASTLE** Estas malvere, sinjoro Hardcastle. Mi nur estis dudekjara kiam mi naskis Tonym, la filon de sinjoro Lumpkin, mia unua edzo, kaj la knabo ne estas ankoraŭ maturaĝa.
- S-RO HARDCASTLE** Kaj li neniam estos; tion mi certigas. Ho, jes, vi edukis lin belege.
- S-INO HARDCASTLE** Tio ĉi taŭgas por nenio. Tony Lumpkin havas riĉaĵojn; mia filo ne bezonas klerecon por vivi. Mi opinias, ke junulo ne bezonas multe da scioj por elspezi mil kvincent librojn jare.
- S-RO HARDCASTLE** Scioj! Li estas nur amaso da malpravaĵoj kaj petolaĵoj.
- S-INO HARDCASTLE** Spriteco, karulo mia, nenio, mi certigas, ol spriteco. Nu! sinjoro Hardcastle, vi devas konsenti, ke la knabo estas sprita.
- S-RO HARDCASTLE** Ha! mi prefere konsentus jeti lin en trinkejon! Eble vi pensas, ke bruligi la ŝuojn de lakeo, inciteti kaj turmenti la katidojn, timigi la servistinojn, montras spritecon! Se vi jese respondas al ĉi tiu demando, mi tuj konsentos, ke li estas spritulo. Eĉ hieraŭ li ligis mian perukon al la dorsaĵo de mia seĝo, tiel ke mi, pretiĝante por saluti,

trafis la vizaĝon de sinjorino Frizel per mia senhara kapo.

S-INO HARDCASTLE Nu! Ĉu mi devas kulpiĝi je tio? La malfeliĉa knabo ĉiam estis tro malsanema por fari ion bonan. Lernejo estus lia mortigaĵo. Poste, kiam li fariĝos iom pli fortika, kiu scias, kion unu-du latiniĝantaj jaroj povos elfari por li!

S-RO HARDCASTLE Latinaĵon al li? Violonon al kato! Ne, ne! Trinkejo kaj ĉevalejo estas la solaj lernejoj, kiujn li iam vizitos!

S-INO HARDCASTLE Nu, ni ne devas nun malkuraĝigi la malfeliĉulon, ĉar mi timas, ke ni ne havos lin longe ĉe ni. Kiu ajn rigardas lian vizaĝon povas vidi ke li estas ftizulo.

S-RO HARDCASTLE Certe, se tro grasiĝi estas unu el la simptomoj.

S-INO HARDCASTLE Li kelkfoje tusas.

S-RO HARDCASTLE Jes, kiam lia trinkaĵo iras malrekten.

S-INO HARDCASTLE Sed mi, vere, timas pri liaj pulmoj.

S-RO HARDCASTLE Kaj vere mi ankaŭ timas pri ili, ĉar li kelkfoje kriegas tiel brue kiel marŝparoltubo.
(Tony ekkrias ekstere) Ha! jen vi aŭdas lin; tre ftizema li ŝajnas, sendube!
(venas Tony trairanta la scenejon)

- S-INO HARDCASTLE** Tony, kien vi iras, mia ĉarmulo? Ĉu vi ne donos al paĉjo kaj mi la plezuron de via ĉeesto?
- TONY** Mi devas rapidi, patrino, kaj ne povas resti tie ĉi.
- S-INO HARDCASTLE** Vi ne foriros tian frostan vesperon, karulo mia; vi jam ŝajnas terure malsana.
- TONY** Mi ripetas, ke mi ne povas prokrasti mian foriron. La Tri Kolomboj min atendas je ĉiu minuto. Tie tuj okazos ŝercado.
- S-RO HARDCASTLE** Ha, jes, la trinkejo lin alvokas; la kutima loko, kiel mi pensis.
- S-INO HARDCASTLE** Anaro da trivialuloj kaj maldelikatuloj!
- TONY** He, ne tro maldelikataj ili estas, mi certigas. Tie estas Eĉjo Faŭkul, la akcizoficisto, Joĉjo Ĵargono, la ĉevalkuracisto; eta Aminadabo, kiu muelturnas la gurdon; kaj Tom Tordul, kiu pivotrulas la stanpladegon.
- S-INO HARDCASTLE** Kara mia, unu fojon almenaŭ, malkontentigu ilin!
- TONY** Ho, ne estus grave malkontentigi ilin, sed mi ne povas elteni la ideon malkontentigi min samtempe.
- S-INO HARDCASTLE** (*lin detenante*) Vi ne foriros!
- TONY** Mi ree certigas, ke mi tuj iros.

- S-INO HARDCASTLE** Mi ripetas, ke vi ne tion faros.
- TONY** Ni vidu tuj, kiu estas pli forta, ĉu vi aŭ mi!
(li foriras, samtempe tirante ŝin kun si)
- S-RO HARDCASTLE** *(sola)* Ha! jen estas paro, kiu nur sin intermalbonigas. Sed, vere, ĉiuj nunaj moroj helpas por forpeli saĝon kaj singardemon eksterdomen. Ekzemple, mia beleta karulino Kotinjo: mi timas, ke la nunaj modoj preskaŭ ankaŭ ŝin atakis. Loĝinte unu-du jarojn en la ĉefurbo, ŝi nun amas gazon kaj francajn ĉifaĵojn, kiel la plej mirigaj el ĉiuj.
(venas fraŭlino Hardcastle)
- S-RO HARDCASTLE** Benojn al mia beleta puranimulino! Feste vestita laŭ kutimo, Kotinjo mia. Ĉielo! Kiom da superflua silko vi portas ĉirkaŭ vi, knabino! Mi neniam povos kompreni la nuntempajn malsaĝulojn, ke malriĉanaro tute povus vestigi, nur el la falbalejo de la sinmontremuloj.
- F-INO HARDCASTLE** Vi konas nian interkonsenton, sinjoro. Al mi vi lasas la matenan tempon por gastigi kaj vizitadi geamikojn, kaj ankaŭ vesti min laŭ mia fantazio; vespere mi mastraĵe vestas min por vin kontentigi.

- S-RO HARDCASTLE** Nu, memoru, ke mi insistas pri la kondiĉoj de nia kontrakto, kaj, parenteze, mi pensas, ke hodiaŭ vespere estos okazo provi vian obeemon.
- F-INO HARDCASTLE** Mi certigas, sinjoro, ke mi tute ne komprenas tion, kion vi volas diri.
- S-RO HARDCASTLE** Nu, ĉar mi deziras ĉion klarigi por vi, Kontinjo, mi atendas hodiaŭ viziton de juna sinjoro, kiun mi elektis kiel vian estontan edzon. Mi havas leteron de lia patro, en kiu tiu ĉi sciigas al mi, ke la junulo estas nun veturanta ĉi tien, kaj li mem tuj poste intencas sekvi lin.
- F-INO HARDCASTLE** Vere! Estas domaĝo, ke mi ne pli frue sciigis pri tio! Dibenon al mi! Kiel mi konduku? Mil ŝancoj estas kontraŭ unu, ke mi ne ŝatos lin. Nia intervidiĝo estos tiel ceremonia kaj aranĝita afero, ke eble ne venos okazo por amikeco aŭ por estimo.
- S-RO HARDCASTLE** Sed trankviliĝu, knabino; mi neniam volus kontraŭstari vian elekton. Estas vere ke sinjoro Marlow, kiun mi proponas, estas filo de mia malnova amiko, Sir Charles Marlow, pri kiu tiel ofte vi aŭdis min paroli. La juna sinjoro tre lerne edukiĝis kaj liaj gepatroj intencas, ke li sin prezentu

por ofico en la servo de lia lando. Oni ankaŭ diras, ke li estas tre lerta kaj inteligenta.

F-INO HARDCASTLE Ĉu vere?

S-RO HARDCASTLE Grandanima.

F-INO HARDCASTLE Nun, mi pensas, ke mi lin ŝatos.

S-RO HARDCASTLE Juna, kaj brava.

F-INO HARDCASTLE Certe, mi ŝatos lin.

S-RO HARDCASTLE Kaj vere belulo,

F-INO HARDCASTLE Kara paĉjo, nenion aldonu. (*kisante lian manon*) Mia li estas; mi lin havos.

S-RO HARDCASTLE Kaj por kroni ĉion, li staras unu el la plej modestaj kaj memdetenaj junuloj en la mondo.

F-INO HARDCASTLE Ha! Nun vi ĵus morte refrostis min. Tiuj vortoj, modesta, memdetena, forigas liajn aliajn ecojn. Silentema amanto, oni diras, ĉiam fariĝas suspektema edzo.

S-RO HARDCASTLE Kontraŭe; modesteco malofte loĝas en brusto, kiun pli noblaj virtoj ne riĉigas. Estas tiu eco mem, kiu unue altiris min al li.

F-INO HARDCASTLE Li certe devos posedi pli logigan econ por min kapti: tion mi atestas. Se, tamen, li estas tiel juna, tiel bela, kaj tiel ĉiohava

kiel vi ĵus diris, kredeble li taŭgos. Jes, mi opinias, ke mi lin havos.

S-RO HARDCASTLE Sed, Kotinjo, eble estos alia baro. Tio estas ŝanca afero. Ĉu li mem volos aŭ ne volos vin havi?

F-INO HARDCASTLE Kara patreto mia, kial vi tiel klopodas por min humiligi? Nu, se li rifuzos, anstataŭ rompi mian koron pro lia malŝato, mi rompos la spegulon pro ĝia flatado, kaj, aranĝinte mian kapveston laŭ la plej nova modo, mi tuj serĉos pli oportunan adoranton.

S-RO HARDCASTLE Brava decido! Dume mi tuj iros prepari la servistojn por lia bonveno; ĉar ni malofte gastigas vizitantojn, nia servistaro bezonas dresadon tioin kiom rekrutaro je la unuataga kunveniĝo. (*foriras*)

F-INO HARDCASTLE Tiu ĉi novaĵo de paĉjo tremetigas min. Juna, bela, tiujn ecajn adjektivojn patro laste ordigas, sed mi unuavice metas ilin. Mi vere ŝatas iun, kiu estas lerta, bonkora, k.t.p. Sed, tiam, esti memdetena kaj modesta multo lin kontraŭbatalas. Ĉu, tamen, li ne povos resanigi de tiuj malsanejoj, fierante pri sia edzino? Jes! kaj ĉu, laŭe, ibi ne povos? . . . Sed, ho, mi mal-

sprite jam aranĝas pri edzo, eĉ antaŭ ol mi certiĝu pri amanto.

(venas fraŭlino Neville)

F-INO HARDCASTLE Mi ĝojas pro via alveno, kara Neville. Diru al mi, Konstanjo, kiel mi aspektas ĉi vespere. Ĉu estas io kapricema en mia miemo? Ĉu estas hodiaŭ unu el la tagoj, en kiuj mi aspektas pli bela? Fine, ĉu mi vizaĝe brilas?

F-INO NEVILLE Belege, karulino mia. Sed tamen, nun, kiam mi iom pli atente rigardas . . . Beanojn al mi! — Ĉu malfeliĉo okazis, aŭ inter la kanarioj, aŭ ĉe la orfinoj? Ĉu via frato, aŭ eble la kato, petole agis kun ili? Eble la lasta romano estis tro kortuŝa, he?

F-INO HARDCASTLE Ne! Nenio el tio okazis. Oni minacas min je . . . Apenaŭ mi povas ĝin elparoli . . . Min oni minacas je amanto!

F-INO NEVILLE Kaj la nomo lia . . .

F-INO HARDCASTLE Estas Marlow.

F-INO NEVILLE Ĉu eble?

F-INO HARDCASTLE Jes; la filo de Sir Charles Marlow.

F-INO NEVILLE Kion! Li estas la plej intima amiko de sinjoro Hastings, mia propra admiranto. Ili neniam estas malkune. Mi pensas, ke vi

kredeble vidis lin, kiam ni restadis en la ĉefurbo.

F-INO HARDCASTLE Neniam.

F-INO NEVILLE Li estas stranga persono, mi certigas. Li agis kun virtaj kaj bonfamaj sinjorinoj pli modeste ol iu viva viro; sed liaj konatuloj diras, ke li ludas tre malsimilan rolon kun alispecaj kreitinoj. Vi min komprenas.

F-INO HARDCASTLE Stranga individuo, vere. Mi neniam scios, kiamaniere mi devos agi kun li. Kion mi faru? Bagatelo! Mi ne pensu pri li! Mi fidu la circonstancojn por sukcese agi. Sed kiel sukcesas la via afero, karulino? Ĉu mia patrino persiste vin amindumas por mia frato Tony, laŭ sia kutimo?

F-INO NEVILLE Mi ĵus revenis de unu el niaj agrablaj interviziĝoj, dum kiu ŝi diris al mi centon da karesvortoj, kaj laŭdadis sian beletan monstran filon, kiel perfektan miregulon.

F-INO HARDCASTLE Kaj tia estas ŝia partieco por li, ke ŝi vere tiel pensas. Valora doto simila al via fariĝas ne malgranda allogaĵo. Cetere, kiel ŝi ĝin administras, mi ne miras vidi ŝin malvole ellasi ĝin el la familio.

F-INO NEVILLE Mia doto, kiu konsistas precipe el juveloj, ne povas esti tiel forta tentaĵo. Sed, kio ajn

okazos, se mia kara Hastings nur estos konstanta, mi ne dubas, ke fine mi fariĝos eĉ tro obstina por ŝi. Dume, mi kredigis al ŝi, ke mi enamiĝis al ŝia filo, kaj ŝi neniel imagasas, ke mia koramo loĝas tute aliloke.

F-INO HARDCASTLE Mia bona frato brave kontraŭstaras al ŝi. Mi preskaŭ amas lin, ĉar li tiel malamas vin.

F-INO NEVILLE Ho, interne li estas bonkorulo, kaj sendube li estus kontentega, se mi edzinigus kun iu ajn, escepte li mem. Sed la sonorigito de mia onklino nin vokas por la posttagmeza promeno ĉirkaŭ la bieno. Allons? Kuraĝo estas necesa, ĉar niaj aferoj fariĝas hazardaj.

F-INO HARDCASTLE Ha! ke venu la dormhoru, kune kun ĉio sukcesiga! (*ili foriras*)

SCENO 2

*Ĉambro en trinkejo. Aro da vulgaraĵ personoj.
Punĉo kaj tabako. Tony sidas apud supra tablo,
kun maleto en la mano.*

- ĈIUJ Hura! hura! hura! prave!
- 1-A PERSONO Nun, sinjoroj, silentu! Ni tuj havos kanton. Lia bienestra Moŝto tuj frapos, por ke li mem kantu.
- ĈIUJ Jes, kanton! kanton!
- TONY Nu, do, sinjoroj, mi tuj kantos al vi kanton, kiun mi mem verkis pri tiu ĉi gastejo, La Tri Kolomboj.
- TONY *(kantas)*
Lernejestroj turmentu la cerbon
Pri gramatiko, lerno sensenca;
Bona punĉo klarigas la verbon
trinki! Ĉi tio estas esenca!
Kial disputi pri idolaj dioj,
Aŭ paroli pri la Stiksaj bordoj?
Taŭgas ne la latina vortaro —
Vi, naivega domkolombo!
- HORO Tolderol — derol,
Tolderol — do!

- TONY Kiam diras gravulo, ke peko
Trinki estas, mi ja vetus sumon
Ke l' fripono, pro timo de seko,
Enlikvorigas haŭtan plenumon.
Sed al li se vi alportos pencojn
Por ke tiel sobriĝu la homaro,
Dio klarigu viajn pripensojn . . .
Ho naivega, domkolombo?
- ĤORO Tolderol — derol,
Tolderol — do!
- TONY Ĉar ni estas tre gajaj kaj lertaj,
La punĉujon tuj pasigu, knaboj,
Por ke ni krii per voĉoj fortaj:
"Longan vivon al La Tri Kolomboj!"
Iu nur vivu por leporĉaso,
Aŭ anasojn ansere preferu?
Tamen, el ĉiu la birdamaso,
Ĉiam "La Tri Kolomboj" prosperu,
- ĤORO Tolderol — derol,
Tolderol — do!
- ĈIUJ Prave! prave!
- 1-A PERSONO Lia Moŝto havas taŭgegan kuraĝon!
- 2-A PERSONO Mi koramas aŭdi lin kanti, ĉar li neniam
kantas krom tion, kio ne estas vulgara.
- 3-A PERSONO Ho, nenion kio estas vulgara; tion mi ne
povos elporti.

- 4-A PERSONO Ĝentileco estos ĝentileco en ia tempo. Se iu sinjoro nur sin sentas tiel inklina . . .
- 3-A PERSONO Mi aprobas vian filozofion, kunfrato Faŭkul. Ĉu mi mem ne estas devigata danciĝi urson? Nu, tio taŭgas por nenio en vira ĝentileco. Estu tio (*trinkas*) mia venenpokalo, se iam dancas mia urso krom je la plej ĝentilaj arioj, tiaj kiaj *Akvo forlasis la maron*, aŭ la *Minueto en Ariadno*.
- 2-A PERSONO Estas granda domaĝo ke Lia Juna Moŝto, sinjoro Lumpkin, ne ankoraŭ ĝuas sian maturaĝan havon! Ha, tio fariĝos bonaĵo por ĉiuj trinkejestroj en dekmejla ĉirkaŭaĵo.
- TONY Je Dio, vi estas prava, amiko Ĵargono. Mi tiam montros, kio estas ĉeesti nur kun eminentularo.
- 2-A PERSONO Ho, li tute similas al sia propra patro, en tio. Certe, la maljuna bienestro Lumpkin estis la plej inda sinjoro, kiun mi vidis en la mondo. Por blovi la ĉaskornon, aŭ trabati arbetaron, post leporo, li estis senegala. Oni ofte diris tie ĉi, ke li posedis la plej belajn ĉevalojn kaj hundojn en la tuta regiono.

- TONY Je Dio, kiam mi plenaĝiĝos, mi provos fariĝi vera filo de mia patro, tion mi promesas. Mi jam pensis pri Bet Bouncer, kaj ankaŭ la griza ĉevalino de la muelisto, por komenci. Sed, vigliĝu, knaboj miaj; trinku kaj gajiĝu, ĉar vi ne pagos por io — Nu! Stingo, kio okazis!
- (venas la trinkejstro)*
- TRINKEJSTRO Estas du sinjoroj en veturilo ĉe la pordo. Ili perdis sian vojon en la arbaro, kaj ili diris ion pri sinjoro Hardcastle.
- TONY Unu el ili devas tutcerte esti la sinjoro, kiu venas por amindumi mian fratinton. Ĉu ili ŝajnas Londonanoj?
- TRINKEJSTRO Kompreneble ili estas, ĉar ŝajnas al mi, ke ili tute havas francan mienon.
- TONY Petu do, ke ili alpaŝu tien ĉi, kaj mi, en la daŭro de palpebrumo, direktos ilin.. *(la trinkkejstro foriras)* Sinjoroj, kredeble ili ne estos sufiĉe ĝentilaj kunuloj por vi. Malsupreniru dum minuto, mi tuj iros kun vi, en la daŭro de citronpremejo. *(ili foriras)*
- TONY *(sola)* Mia duonpatro dum la lastaj ses monatoj nomis min ursido, hundo. Nun, se mi nur volus, mi povus venĝi min al la maljuna riproĉanto. Sed mi timas . . . Mi

timas kion? Baldaŭ mi ĝuos mil kvincent librojn jare. Timigu li min el tio, se li povas.

(revenas la trinkejestro kune kun Marlow kaj Hastings)

MARLOW

Kia enuiga, maloportuna tago, hodiaŭ fariĝis por ni! Oni diris al ni, kiam ni ekveturis, ke ne estas pli ol kvardekmejla trafikampara vojo, kaj mi certigas, ke ni jam veturis pli ol sesdek mejlojn.

HASTINGS

Kaj ĉio okazis, Marlow, nur pro via neklarigebla silentemo, kiu ne permesas al ni pli ofte demandi pri la rekta vojo.

MARLOW

Mi konfesas, Hastings, ke malvole mi demandas aŭ akceptas direktojn de ĉiu, kiun ni renkontas; ofte pro timo de malĝentila respondo.

HASTINGS

Nun, tamen, kompreneble ni ricevos nian respondon.

TONY

Vian pardonon, sinjoroj; sed oni ĵus diris al mi, ke vi demandis pri sinjoro nomita Hardcastle, loĝanta en tiu ĉi regiono. Ĉu vi konas la landparton, en kiu vi vin trovas?

HASTINGS

Neniel, sinjoro, sed ni kore dankos vin por la informo.

TONY

Ĉu vi ne konas la vojon, tra kiu vi alvenis?

- HASTINGS Ne, sinjoro, sed se vi povos sciigi . . .
- TONY Nu, sinjoroj, se vi konas nek la vojon, kiu kondukas al via celo, nek la lokon, kie vi nun staras, nek la vojon, tra kiu vi alveturris, la unua sciigo, kiun mi donos al vi, estas, ke vi perdis vian vojon.
- MARLOW Ni ne bezonis profeton por diri tion al ni.
- TONY Vian pardonon, sinjoroj, sed ĉu vi permesas al mi demandi, de kiu loko vi venis?
- MARLOW Tio ne estas necesa por ke vi diru al ni, kiun vojon ni devas nun iri.
- TONY Vian pardonon. Sed demando pro demando estas justeco, ĉu ne? Nu! sinjoroj, ĉu tiu Hardcastle ne estas malafabla, malnovmoda, kapricema malbelulo, kiu havas filinon kaj beletan filon?
- HASTINGS Ni ne ankoraŭ vidis la sinjoron, sed li havas idaron tian, kian vi ĵus menciis.
- TONY Jes, la filino estas granda, ĵonglema, malgracia, babilema majmasto; la filo, bela, instruita kaj ĝentila junulo, amata de ĉiuj.
- MARLOW Niaj informoj diferencas pri tio. Ni aŭdis, ke la filino estas tre bela kaj bone edukita; la filo, malklera sengraciulo, precipe malbonigita de la senĉesa patrina gvidrulado.

- TONY He! he! hem! Nu, sinjoroj, ĉio, kion mi povas diri, estas, ke vi ne atingos la domon de sinjoro Hardcastle hodiaŭ nokte: tio estas kredebla.
- HASTINGS Kia malfeliĉo!
- TONY Estas longa, malluma, marĉa, malpura, kaj danĝera vojo. Stingo, klarigu al la sinjoroj, kia estas la vojo, kiu kondukas al sinjoro Hardcastle (*palpebrume signodonas al Stingo*), sinjoro Hardcastle de Starakva marĉo, vi komprenas.
- TRINKEJESTRO Sinjoro Hardcastle! ho ve! ho ve! Karaj sinjoroj, vi veturis terure eraren! Kiam vi atingis la malsupron de la monteto, vi devus esti irintaj ĝis Skuaŝvojet.
- MARLOW Ĝis Skuaŝvojet?
- TRINKEJESTRO Tiam, veturinte rekte antaŭen vi renkontus kvar vojojn — —
- MARLOW Ĝis la kruciĝo de kvar vojoj?
- TONY Jes, sed vi devas certiĝi, ke vi nur unu el ili elektas — —
- MARLOW Vi ŝercas, sinjoro.
- TONY Kaj tiam sekvante la dekstran flankon, vi iru ĝis vi atingas Cerbromperikejon; tie, tre atente vi rigardu la radosignojn kaj daŭrigu ĝis la garbejo de farmestro Ŝafa-

pest. Ĉe la garbejo vi devos turni dekstren, poste maldekstren, kaj ree dekstren ĝis vi trovos la malnovan muelejon — —

MARLOW

Malbeno! Nu, ni pavus same facile eltrovi la longitudon!

HASTINGS

Kion ni faru, Marlow?

MARLOW

Tiu ĉi domo ne promesas grandan komforton; kvankam eble la gastejestro povus nin gastigi.

TRINKEJESTRO

Bedaŭrinde, sinjoro, estas nur unu kroma lito en la tuta domo.

TONY

Kaj, miascie, tiu lito jam estas okupata de tri loĝantoj. *(post paŭzo, dum kiu la ceteraj ŝajnas konfuzitaj)* Jen estas rimedo. Ĉu vi ne pensas, Stingo, ke la gastejestrino bonvolos doni tri seĝojn kaj kapkusenon por la sinjoroj, apud la fajrejo?

HASTINGS

Mi malamas dormi apud la fajrejo.

MARLOW

Kaj abomenaj estus tri seĝoj kaj kapkusenono.

TONY

Ho, vi malkonsentas tian aranĝon! Mi do pripensu! Ĉu vi konsentos iri alian mejlon, ĝis la gastejo La Kaprokapo; la malnova Kaprokapo, sur la supro de la monteto, unu el la plej bonaj gastejoj en la tuta regiono?

- HASTINGS Ho do, ni eskapis de ne tro agrabla aventuro, almenaŭ por tiu ĉi nokto.
- TRINKEJESTRO (*flanken al Tony*) Ho! Ĉu vi intencas sendi ilin al via patro, kredantaj ke la domo estas gastejo!
- TONY Silentu, vi malsaĝulo! Ili tion eltrovos. (*al la aliaj*) Vi nur bezonas iri rekte ĝis vi alvenos al malnova domo, flanke de la vojo. Vi vidos paron da kornejoj super la pordo. Tio estas la elpendaĵo. Sentime veturu en la korton kaj laŭte voku!
- HASTINGS Sinjoro, ni kore dankas vin. Niaj servistoj ne povas erariri.
- TONY Ne, ne. Sed mi tamen devas diri al vi, ke la gastejestro estas riĉa kaj intencas baldaŭ eliĝi de la komerco; tial li deziras montri sin kiel ĝentilulo; vian pardonon! hi! hi! hi! Li donos al vi sian ĉeeston, kaj, je Dio, se vi atentus lin, li vin igos kredi, ke lia patrino estis konsilano, kaj lia onklino pacojuĝisto!
- TRINKEJESTRO Maljuna, teda individuo, certe; sed liaj vinoj kaj litoj estas bonaj kiel ie ajn alie en la lando.

- MARLOW Nu, se li tiujn prezentos al ni, taŭgos por nenio alia detalo. Ni devas turni dekstren, ĉu ne?
- TONY Ne, ne, rekte antaŭen. Mi kuniros kelkajn paŝojn por montri al vi parton de la vojo.
(al la trinkejestro) Silentu!
- TRINKEJESTRO Ha vi estas agrable dolĉa, petola trompanto.
(ĉiuj foriras)

DUA AKTO

SCENO 1

Malnova kampara domo.

(Venas sinjoro Hardcastle sekvata de tri aŭ kvar malgraciaj servistoj)

S-RO HARDCASTLE Nu, mi esperas, ke vi tute perfektigis pri la tabloserva ekzercado, kiun mi igis vin fari dum la lastaj tri tagoj. Vi ĉiuj konas viajn lokojn kaj okupojn; kaj eble ŝajnos, ke vi kutime servas altrangajn personojn, kvankam vi neniam eliris el la domo.

ĈIUJ Jes, jes.

S-RO HARDCASTLE Kiam venos gastoj, vi ne devos forkuri por rigardegi kaj tiam ree enkuri, simile al kunikloj en densejo.

ĈIUJ Ne, ne!

S-RO HARDCASTLE Nu, vi, Diggory, kiun mi forprenis el la garbejo, devos vin montri apud la flanktablo; kaj vi, Eŭgeno, kiun mi altigis de la plugilo, devos vin lokigi malantaŭ mia seĝo. Sed vi ne tiel staru kun manoj en viaj

poŝoj. Eltiru la manojn el la poŝoj, kaj ne metu ilin al via kapo, vi, malsaĝulo! Rigardu al Diggory, kiel li tenas siajn manojn: tro rekte eble li tenas ilin, sed tio ne gravas.

DIGGORY Jes, vidu, kiel mi tenas ilin. Mi lernis tiel ilin teni dum la tempo, kiam mi estis dresata por la militantaro. Kaj, poste, ekzerĉiginte. . . .

S-RO HARDCASTLE Vi ne rajtas esti tiel babilema, Diggory. Vi devos tute atenti la gastojn. Vi nin aŭdos interparoli, sed ne vi rajtos paroli; vi vidos nin trinki, sed vi ne rajtos pensi pri trinkaĵo; vi vidos nin manĝi, sed vi ne rajtos mem pensi pri manĝaĵo.

DIGGORY Leĝegoj! Via Moŝto, tio estas tute neebla! Kiam ajn Diggory vidas manĝantojn, je Dio, li ĉiam deziras peceton por si mem.

S-RO HARDCASTLE Malspritulo! Ĉu ventropleniĝo en la kuirejo ne estas same bona kiel ĝi estas en la manĝoĉambro? Satigu vian stomakon per tiu penso.

DIGGORY Je Dio, mi dankas al Via Moŝto. Mi aranĝos, por pacigi mian malsaton, taŭgan kaj sufiĉam tranĉaĵom da malvarma bovaĵo en la manĝaĵejo.

S-RO HARDCASTLE Diggory, vi tro babilas. Nu, se okazos, ke mi diros spiritaĵon, aŭ rakontos ŝercan anekdoton dum la manĝado, vi ne rajtos ĉiuj ridegi, kvazaŭ vi partoprenus en la gastigo.

DIGGORY Je Dio, Via Moŝto ne rajtos do rakonti la historion pri maljuna tetro en la paflegejo. Mi ne povas min deteni ĉe tio; ĝi ĉiam devigas min ridi: hi! hi! hi! Je mia animo, ne estas eble! Ni ridegadis pri ĝi dum la lastaj dudek jaroj — ha! ha! ha!

S-RO HARDCASTLE Ha! ha! ha! Jes, la rakonto estas ŝercega. Bone! honesta Diggory, vi povos ridi pri ĝi. Sed, memoru, ke vi devos esti tre atenta. Nu, supozu, ke gasto demandas glason da vino, kiel vi agos? Glason da vino, sinjoro, mi petas! (*al Diggory*) Nu! kial vi ne moviĝas?

DIGGORY Je Dio, Via Moŝto, mi neniam kuraĝas antaŭ ol la manĝaĵo kaj trinkaĵo estas sur la tablo; sed tiam mi kuraĝos kiel leono.

S-RO HARDCASTLE Kion? Ĉu neniu el vi moviĝos?

1-A SERVISTO Vi devigis min ne forlasi tiun ĉi lokon!

2-A SERVISTO Mi certigas, ke mia ofico ne estas tio!

3-A SERVISTO Kaj mi atestas, ke ĝi ne estas mia!

DIGGORY Mia certegiĝo! Ĝi ne estas mia devo!

S-RO HARDCASTLE Ho diskutantaj azenoj! Dum vi, kiel viaj superuloj, disputos pri oficoj, la gastojn vi devigos malsati kaj soifi! Ho! naiveguloj! Nun mi ree devas dresi vin! Sed, aŭskultu: ĉu mi ne ĵus aŭdis veturilon, kiu eniras la korton! Flanken, antaŭen, ĉien, vi ŝtipkapuloj! Ĉiu estu sur sia loko! Dume, mi tuj iros al la pordego por kore bonvenigi la filon de mia malnova amiko!

(foriras)

DIGGORY Je ĉiuj! Mia lokiĝo tute foriris el la cerbo.
ROGER Mi bone scias, ke mia okupo konsistas el tio, ke mi estu ĉie.

1-A SERVISTO Kio estas mia?

2-A SERVISTO Mia okupo postulas, ke mi estu nenie; tial mi tuj iros ĝin fari.

(foriras servistoj kurante tien kaj reen, timege)

(venas servisto kun kandeloj, kune kun Marlow kaj Hastings)

SERVISTO Bonvenon, sinjoroj, bonvenegon! Venu tien ĉi, mi petas.

HASTINGS Post nia hodiaŭa malkontentiĝo, koran bonvenon, Karlo, al komfortaj pura ĉambro kaj bona fajro! Per mia vorto, tre bel-

aspekta domo tiu ĉi estas; antikveca eble, sed tre konvena.

MARLOW

Tio estas la sorto de granda domo. Ĝi unue ruinigas la posedanton per troa gastamo, kaj tiam ĝi fariĝas gastejo, por kolekti pagojn de la gastoj.

HASTINGS

Kiel vi diris, ni vojaĝantoj devas pagi por ĉiu ĉi ornamaĵoj. Mi ofte vidis, ke, kvankam belega telermeblo aŭ marmora kamentornamo ne estas nomitaj, ili tamen terure altigas la fakturon.

MARLOW

Vojirantoj, Georgo, ĉiuloke devas elspezi. La sola malsameco, laŭ mi, estas, ke en bonaj gastejoj luksaĵo tre kare kostas, dum malbonaj gastejoj ne nur vin senigas, sed ankaŭ vin malsatigas.

HASTINGS

Vi jam vizitis multajn diversajn gastejojn. Vere mi tre ofte miriĝas, ke vi, kiu tiel vivis tra la mondo, kiu posedas neordinaran saĝon, kaj por kiu tiom da okazoj prezentigis, neniam povis akiri sufiĉan porcion da memfido.

MARLOW

Tio estas angla malsano. Sed, diru al mi, Georgo, kie mi estus akirinta tiun memfidon, pri kiu vi parolas? Ĝis nun mi pasigis la tempon aŭ en kolegio aŭ en gastejoj,

tute senigita de la ĉarma parto de la homaro, kiu faras viron memfida. Ŝajnas al mi, ke vere mi neniam konatiĝis kun ĝentila modesta sinjorino — esceptinte mian patrinon.

HASTINGS

Kiam vi ĉeestas inter bonfamaj sinjorinoj, mi neniam vidis tiel malspritan tremulon kiel vin mem; vi tute ŝajnas, kvazaŭ vi bezonus trovi okazon por forkuri el la ĉambro.

MARLOW

Nu, amiko, la kaŭzo estas, ke tiam mi vere bezonas eliri el la ĉambro! Ofte mi decidis malsilenti kaj babili hazarde. Sed, (mi ne povas klarigi tion), simpla rigardo de paro de belaj okuloj tuj malebligas mian decidon. Senhontulo povas imiti modestulon, sed, je diablo, honesta homo ne povas simili senhontulon.

HASTINGS

Se vi nur povus diri, en ĝentila virina societo, eĉ duonan parton da tiuj spritaĵoj, kiujn mi aŭdis vin detali al gastejkelnerino — —

MARLOW

Miavorte, Georgo, mi ne povas sprite paroli kun ĝentilaj sinjorinoj: ili frostigas, ili ŝtonigas min. Oni rakontas pri kometo, pri elsputa vulkano, aŭ similaj bagateloj:

sed por mi, modesta sinjorino plibeligita je ŝia tuta ornamaĵo, estas la plej grandega estaĵo el la kreitaro.

HASTINGS

Ha! ha? ha! En tiu kazo, junulo, kiel vi esperas iam edziĝi?

MARLOW

Neniam, krom, kiel inter reĝoj kaj princoj, se mi povos pere amindumi estontan edzinon. Vere, se, kiel edziĝanta Orientulo, oni povus kondukiĝi al edzino, kiun oni neniam antaŭe vidis, la afero estus elportebla. Sed trasuferi la terure ceremonian amindumadon, kune kun epizodo de onkloroj, avinoj, kaj gekuzoj, por fine eljeti pafite la demandon "Fraŭlino, ĉu vi volas edziniĝi kun mi?" Ne, ne, tio estas klopdado multe tro granda por mi, mi konfesas.

HASTINGS

Mi kompatas vin. Sed kiel vi intencas do agi kun la fraŭlino, kiun vi tre baldaŭ vizitos, laŭ la demando de via patro?

MARLOW

Tiel kiel mi agas kun aliaj fraŭlinoj: mi do profunde salutas, kaj jese aŭ nee respondos al ĉiuj ŝiaj demandoj. Cetere mi ne pensas, ke mi kuraĝos rigardi ŝian vizaĝon ĝis la alveno de mia patro.

HASTINGS Mi miras, ke vi, tiel fervora amiko, povas vin montri tiel malvarma amanto!

MARLOW Por klarigi la aferon, kara Hastings, veturante kun vi, mia ĉefa intenco estas helpi al via estonta feliĉo, sed ne al mia. Fraŭlino Neville vin amas; la familio ne vin konas; kiel amiko mia, vi ricevos bonvenon; tiam la honoro plenumu la ceteron.

HASTINGS Kara Marlow mia! . . . Sed, forigu sentimentalaĵojn! . . . Se mi estus malnoblulo nur klopodanta akiri riĉecon, vi, amiko, estus la lasta homo en la mondo, kiun mi petus por helpo. Sed nur la kara estaĵo, fraŭlino Neville, estas tio, kion mi demandas, kaj mia ŝi estas; unue, per la konsento de ŝia mortinta patro; due, per ŝia persona inklino.

MARLOW Feliĉulo! Vi posedas talentojn kaj artojn sufiĉajn por kapti ian ajn junulinon. La sorto devigas min admiri la inan sekson, sed interparoli nur kun ĝia popolana parto. La balbutado de mia lingvaĵo, kune kun iom logiga vizaĝo neniam permesos al mi triumfi. Tedo! Nun venas la vanta maljuna gastejestro por nin enuigi.

(venas sinjoro Hardcastle)

- S-RO HARDCASTLE** Sinjoroj, ree koran bonvenon al vi! Kiu estas sinjoro Marlow? Sinjoro, mi kore prezentas la bonvenon al vi. Vi povas vidi, ke ne estas mia kutimo ricevi miajn gastojn starante kun dorso al fajro. Mi ĝoje ricevas ilin, laŭ bona malnova kutimo, tre kore, ĉe la pordego, kaj mi ĉiam zorgas, ke iliaj ĉevaloj kaj kestoj estu taŭge lokitaj.
- MARLOW** (*flanken*) Li jam ricevis niajn nomojn de la servistoj. (*al Hardcastle*) Ni aprobas vian zorgon kaj gastamon, sinjoro. (*al Hastings*) Mi ĵus pensis, Georgo, pri ŝanĝo de niaj veturvestoj morgaŭ matene. Mi terure hontas je miaj.
- S-RO HARDCASTLE** Mi petas, sinjoro Marlow, ke vi sencere monie agu en tiu ĉi domo.
- HASTINGS** Mi pensas, Charles, ke vi estas prava: la unua atako gajnas duonan batalon! Mi intencas militiri per oro kaj blankaĵo.
- S-RO HARDCASTLE** Sinjoro Marlow, — sinjoro Hastings, — Sinjoroj, mi petas, agu senĝene en tiu ĉi domo. Ĝi estas Libera domo, sinjoroj. Vi povas tie ĉi agi, kiel vi plej ŝatas.
- MARLOW** Se, tamen, Georgo, ni tro fervore militiros unue, eble mankos al ni provizaĵo antaŭ ol

ni finos la aferon. Mi prefere konservos la brodaĵon por la reenmarŝo.

S-RO HARDCASTLE Via diro pri reenmarŝo, sinjoro Marlow, rememorigas min, ke la Duko de Marlborough, kiam li iris por sieĝi Denain-on, unue postulis, ke la garnizono — —

MARLOW Ĉu vi ne opinias, ke orventra veŝto tute taŭgos kun simpla bruna jako!

S-RO HARDCASTLE Li unue postulis, ke la garnizono, kiu konsistis el eble kvin mil homoj — —

HASTINGS Mi ne kredas tion: bruno kun flavo faras malriĉan miksaĵon.

S-RO HARDCASTLE Mi ripetas, sinjoroj, kiel mi ĵus diris, li postulis, ke la garnizono, kiu eble konsistis el kvin mil batalantoj — — —

MARLOW Jes, la knabinoj amas belajn vestojn.

S-RO HARDCASTLE Kiu eble konsistis el kvin mil homoj perfekte provizitaj de porcioj kaj armilaro, kapitulacu . . . "Nun," diris la Duko de Marlborough al George Brooks, kiu staris apud li — (vi sendube aŭdis pri George Brooks) — "mi vetas mian dukecon," li diris, "ke, sen verŝi guton da sango, mi tuj kaptos tiun garnizonon. — Tial . . ."

- MARLOW Kion vi pensas, amiko? Ĉu vi helpos nin pli fortike trapuŝi la sieĝon, se vi donos al ni, dume, glason da punĉo?
- S-RO HARDCASTLE Punĉon, sinjoro! (*flanken*) Certe tio ĉi estas la plej neklarigebla speco de modesteco, kiun mi iam renkontis.
- MARLOW Jes, sinjoro, punĉon. Glaso da varma punĉo, post nia veturado, estos tre akceptinda. Vi ĵus diris, ke tio ĉi estas Libera domo.
- S-RO HARDCASTLE Jen estas pokalo, sinjoro.
- MARLOW (*flanken*) Kredeble, tiu ĉi individuo, en sia Libera domo, volos, ke ni havu akurate nur tion, kio plaĉos al li.
- S-RO HARDCASTLE (*tenante pokalon*) Vi ĝin trovos taŭga por via gustumo, mi esperas, ĉar mi ĝin preparis per miaj propraj manoj, kaj vi konsentos, mi pensas, ke la kunmetitaĵo estas tolerebla. Bonvolu aminde intertoasti kun mi, sinjoro. Jen, sinjoro Marlow, ni trinku pro nia plibona konatiĝo. (*trinkas*)
- MARLOW (*flanken*) Kia senhontulo li estas! Sed tute strange li ŝajnas, kaj mi iom imitos lin. (*al li*) Sinjoro, miajn bondezirojn al vi. (*trinkas*)

- HASTINGS** (*flanken*) Evidente tiu ĉi homo volas doni al ni sian ĉeestadon, kaj forgesas, ke li estas gastejestro, antaŭ ol akiri ĝentilecon.
- MARLOW** Juĝante laŭ la bonega enhavo de via pokalo, maljuna amiko, mi pensas, ke vi estas tre okupita en tiu ĉi regiono. Vigla laboro, ĉu ne? Precipe dum la elektotempo, kredible.
- S-RO HARDCASTLE** Ne, sinjoro, mi de longe forlasis tian laboron. Nun, kiam niaj superuloj eltrovis la sistemon reciproke sin interelekti, ne plu estas okupoj por ni, la seninfluaĵaj subuloj.
- HASTINGS** Tial politiko ne allogas vin, mi vidas.
- S-RO HARDCASTLE** Neniel. Antaŭe, mi ĉagreniĝis pri la eraroj de la registaro kiel la aliaj, sed ĉiutage plikolerinte, sen ke la registraro pliboniĝu, mi forlasis la malspritan ludon. De tiam mi ne plu zorgas pri Hyder Ally, aŭ Ally Cawn ol pri Ally Croker. Sinjoro, saluton al vi.
- HASTINGS** Tial, per manĝado supre kaj trinkado malsupre, dum vi ricevas viajn amikojn interne kaj ilin amuzas ekstere, vi bone, plezure kaj ageme vivas.

- S-RO HARDCASTLE Certe, mi multe klopodas ĉirkaŭe. La duonan parton de la paroĥaj disputoj mi pacigas en tiu ĉi saloneto.
- MARLOW *(post trinko)* Kaj vi posedas argumenton en tio pokalo, maljuna sinjoro, pli bonan ol ian ajn en juĝejo.
- S-RO HARDCASTLE Jes, juna sinjoro, tion, kaj iomete da filozofio.
- MARLOW *(flanken)* Nu, estas la unua fojo, ke mi aŭdas pri filozofio de gastejestro.
- HASTINGS Tial do, kiel sperta generalo, vi ilin atakas ĉiuflanken. Se vi trovas, ke ili estas konvinkeblaj prudentuloj, vi atakas ilin per filozofio; se vi trovas, ke ili estas malsaĝuloj vi ilin atakas per tio ĉi — Bonan sannon al vi, mia filozofo. *(trinkas)*
- S-RO HARDCASTLE Bone, tre bone! Dankon al vi: ha! ha! Via generaleco rememorigas min pri princo Eŭgeno, kiam li batalis kontraŭ la turkoj en la batalo de Belgrado. Vi tuj aŭdos.
- MARLOW Anstataŭ la batalo de Belgrado estas nun preskaŭ tempo, mi pensas, paroli pri vespermanĝo. Kion posedas via filozofio, en la domo, taŭgan por vespermanĝo?

S-RO HARDCASTLE Por vespermanĝo, sinjoro! (*flanken*) Ĉu tian demandon oni iam faris al iu homo en lia propra domo?

MARLOW Jes, sinjoro; vespermanĝo, sinjoro; mi sentas apetiton. Mi prirabos la manĝaĵejon, hodiaŭ nokte, mi certigas.

S-RO HARDCASTLE (*flanken*) Tian senhontan hundon miaj okuloj neniam vidis, certe. (*al li*) Nu, vere, sinjoro, pri vespermanĝo mi ne povas diri. Mia Dorothy kaj la kuiristino aranĝas tiajn aferojn inter si. Mi lasas al ili la tutan zorgon de tio.

MARLOW Ĉu vere vi tiel agas?

S-RO HARDCASTLE Entute. Cetere mi kredas, ke ili ĝuste nun estas en konsiliĝo pri la vespermanĝo, en la kuirejo.

MARLOW Mi do petas, ke ili min akceptu kiel konsilanto. Tio estas mia kutima maniero. Kiam mi vojaĝas, mi ĉiam preferas aranĝi pri mia vespermanĝo. Voku la kuiristinon. Ne estu ofendita, sinjoro, mi petas.

S-RO HARDCASTLE Ho, tute ne, sinjoro, tute ne. Tamen, mi ne scias kiel — ĉar nia Bridget, la kuiristino, ne estas tre komunikema en tiaj okazoj — se ni ŝin veniĝos, ŝi eble tiel riproĉe malafabliĝos, ke ni timos resti en la domo.

- HASTINGS Montru do al ni la manĝokarton. Mi petas vin pri tiu favoro. Mian apetiton mi ĉiam reguligas laŭ la manĝokarto.
- MARLOW *(al Hardcastle, kiu rigardas ilin surprizite)* Sinjoro, li estas tute prava, kaj tio ankaŭ estas mia kutimo.
- S-RO HARDCASTLE Sinjoro, kiel gasto, vi rajte povas tie ĉi ordoni. Venu, Roger, alportu tien ĉi la karton de la vespermanĝo. Ĝi estas jam skribita, mi kredas. Via maniero, sinjoro Hastings, memorigas min pri mia onklo, kolonelo Wallop. Li kutimis diri, ke neniu povas esti certa pri sia vespermanĝo antaŭ ol li manĝis ĝin.
- HASTINGS *(flanken)* Ĉio estas ĉe li mezurata laŭ grandega skalo! Lia onklo kolonelo! Ni baldaŭ aŭdos pri lia patrino kiel pacojuĝisto! Sed, ni vidu la manĝokarton.
- MARLOW *(leginte)* Kio estas tio? La unua parto konsistas el . . . la dua manĝero . . . postmanĝaĵo . . . Sinjoro! Ĉu vi pensas, ke ni alkondukas la tutan Lignaĵistan kompanion aŭ eble la Bedfordan korporacion, por gluti tian vespermanĝon? Du aŭ tri manĝaĵetoj, puraj kaj apetitdonaj sufiĉos.
- HASTINGS Legu ĝin, tamen.

- MARLOW *(legas)* Kiel unua plado, je la supro, porkido kun prunsaŭco.
- HASTINGS Fi! vian porkidon mi kore malamas.
- MARLOW Kaj abomena estas via prunsaŭco.
- S-RO HARDCASTLE Tamen, sinjoroj, por malsatuloj, porkido kun prunsaŭco estas tre bona manĝaĵo.
- MARLOW Je la malsupro, bovidcerbo kaj lango.
- HASTINGS Vian cerbon mi ne ŝatas, kara sinjoro, ĝin forigu.
- MARLOW Sed mi ĝin ŝatas. Ĝin ĵetu aparte sur alian pladon.
- S-RO HARDCASTLE *(flanken)* Ilia senhontemo min mirigas. *(al ili)* Sinjoroj, vi estas miaj gastoj, aliiguiton, kion vi volos. Ĉu estas io ajn, kiun vi deziras aliformigi aŭ ŝanĝi, sinjoroj?
- MARLOW Nun, porkpasteĉo, bolita kuniklo kun kolbasoj, kremputingoj, kaj plado da tiftaftafeta kremajoj!
- HASTINGS Peston al viaj artefaritaj manĝaĵoj! Mi estas same embarasita en tiu ĉi domo kiel oni estas ĉe verdaflava tagmanĝo de la franca ambasadoro. Mi bezonas simplan nutraĵon.
- S-RO HARDCASTLE Mi bedaŭras, sinjoroj, ke mi nenion havas kion vi ŝatas; sed se estas io, kion vi ĉefe deziras — —

- MARLOW Kion? Sinjoro, via manĝokarto estas tiel bonega, ke ajna parto de ĝi ŝajnas same bongusta kiel la alia. Sendu al ni tion, kion vi volos. Bonege por vespermanĝo: nun ni vidu ĉu niajn litojn oni taŭge aerumis, kaj se oni bonzorgis pri ili.
- S-RO HARDCASTLE Mi petegas, tute lasu tion al mia zorgo. Ne foriru de tie ĉi.
- MARLOW Lasi al vi tian zorgon? Mi protestas, sinjoro, pardonu al mi, sed mi ĉiam zorgas mem pri tiaj aferoj.
- S-RO HARDCASTLE Mi insistas, sinjoro. Trankviliĝu pri tio.
- MARLOW Vi vidas, ke mi tute intencas tion fari. *(flanken)* Jen estas la plej granda enuigulo, kiun mi iam renkontis.
- S-RO HARDCASTLE Nu, sinjoro, ĉar vi volas iri, mi almenaŭ vin akompanos. *(flanken)* Eble tio estas nuntempa modesteco, sed mi neniam vidis ion, kiu tiel similas al la malnovmoda senhontemo.
- (eliras Marlow kun sinjoro Hardcastle)*
- HASTINGS *(sola)* Nu, mi pensas, ke la ĝentilaĵoj de ĉi tiu individuo tuj fariĝos tedegaj. Sed kiu povas koleri je liaj afablecoj, kies celo estas nin kontentigi? Ha! kion mi vidas? Fraŭlino Neville, per la feliĉego!

(venas fraŭlino Neville)

- F-INO NEVILLE Mia kara Hastings! Al kia neatendeble bona ŝanco, aŭ okazintaĵo mi devas alkalkuli tiun ĉi feliĉan renkonton?
- HASTINGS Ne, ne, vi devigas min postuli saman demandon, ĉar mi neniam povis esperi ke mi renkontus mian karan Constance en gastejo.
- F-INO NEVILLE Gastejo! Certe, vi eraras! Mia onklino, mia zorganto loĝas tie ĉi. Kio povis igi vin kredi, ke ĉi tiu domo estas gastejo?
- HASTINGS Mia amiko, sinjoro Marlow, kun kiu mi alvenis, kaj mi, estas venintaj tien ĉi kiel al gastejo, mi certigas. Junulo, kiun ni okaze renkontis en domo nemalproksima, montris al ni la rektan vojon.
- F-INO NEVILLE Certe, tio estas unu el la petolaĵoj de mia senĝena kuzo. Vi tre ofte aŭdis min paroli pri li; ha! ha! ha! ha!
- HASTINGS Tiu, kiun via onklino intencas kunigi al vi? Tiu, pri kiu mi sentas min rajte timema?
- F-INO NEVILLE Vi havas liaflanke nenion por timi. Vi lin adorus, se vi nur scius, kiel kore li min malestimas. Mia onklino scias tion, kaj prenas sur sin la taskon amindumi min por sia filo; ŝi vere pensas, ke ŝi venkos.

HASTINGS

Kara hipokritulineto! Mi devas sciigi al vi, mia Constance, ke mi kaptis la feliĉan okazon, kiu alkondukis mian amikon tien ĉi, por min prezenti al la familio. La ĉevaloj, kiuj veturigis nin, estas nun lacaj pro la vojiro, sed ili baldaŭ estos ripozintaj; kaj tiam, se mia karegulino fidus sian fidelan Hastings, ni baldaŭ estos en Francujo, kie, eĉ inter sklavoj, la edziĝleĝojn oni respektas.

F-INO NEVILLE

Mi ofte jam diris al vi, ke, kvankam mi estas preta vin obei, tamen, mi malvole forlasus mian posedaĵeton. La plej grandan parton de ĝi mi heredis de mia onklo, la Hindia direktoro, kaj ĝi precipe konsistas el juveloj. Mi jam penis konvinki mian onklinon, ke rajte ŝi devus permesi, ke mi portu ilin. Mi kredas, ke baldaŭ mi bone sukcesos. Tuj kiam mi ilin posedos, mi elturniĝos tiel, ke ili kaj ankaŭ mi mem, estos viaj.

HASTINGS

Ho, pereu la bagateloj! Via persono estas ĉio, kion mi deziras. Dume, mia amiko Marlow ne devas scii pri sia eraro; ĉar mi konas lian strangan memdetenemon; se ni subite sciigos al li pri tio, li tuj foriros el

la domo, antaŭ ol nia projekto eĉ pretiĝos por plenumiĝo.

F-INO NEVILLE

Sed kiel ni povos igi lin resti en tia trompiĝo! Fraŭlino Hardcastle ĵus revenis de la promeno; ĉu ni daŭrigu lin mistifiki? Venu tien ĉi. *(ili flanken kunparolas)*
(venas Marlow)

MARLOW

La diligentaj ĝentilaĵoj de tiuj ĉi honestaj gastejanoj tudas min pli ol mi povas suferi. La gastejestro tute pensas, ke estus malĝentile lasi min sola; tial mi devas ne nur elporti lin, sed ankaŭ lian malnovmodan edzinon. Kaj ili intencas veni por vespermanĝi kun ni; tiam, kompreneble, ni devos akcepti la tutan amason de la familio. Sed, tio! Kiun ni havas ĉi tie?

HASTINGS

Kara Charles mia! Permesu, ke mi gratulu vin! La plej feliĉa okazo! Kiu, viapense, venis ĉi tien?

MARLOW

Mi ne povas diveni.

HASTINGS

Niaj amatinoj, karulo; fraŭlino Hardcastle kaj fraŭlino Neville. Permesu, ke mi prezentu al vi fraŭlinon Constance Neville. Okazis, ke ili tagmanĝis en ĉi tiu najbaraĵo, kaj, returne, ili ĵus alvenis tien ĉi por ĉevalŝanĝo. Fraŭlino Hardcastle ĵus eniris

la apudan ĉambron, kaj tuj revenos. Ĉu tio ne feliĉe okazis, he?

MARLOW *(flanken)* Mi jam sufiĉe malkontentiĝis, per mia konscienco! Nun okazas alia fariĝo por plenegigi mian konfuzegon.

HASTINGS Nu! Ĉu tio ne estas la plej feliĉa renkonto en la mondo? Diru.

MARLOW Ho, jes. Tre feliĉa, vere — plej ĝojiga renkonto. Sed niaj vestoj, Georgo, vi bone scias, estas tute malordaj. Nu! Ĉu ni ne povus prokrasti la feliĉon ĝis morgaŭ! Morgaŭ, ĉe ŝi, en ŝia propra domo, estos entute pli dece, kaj iom pli respektme. Estu morgaŭ. *(pretiĝas por foriri)*

F-INO NEVILLE Neniel, sinjoro. Via ceremoniaro malplaĉos al ŝi. Kion? La vojiraj vestoj, kiujn vi nun portas, nur montros vian fervoran deziron; cetere, ŝi scias, ke vi estas en la domo, kaj permesos al vi, ke vi vidu ŝin.

MARLOW Ho! kiel mi tion eltenos? Hem! hem! Hastings vi ne rajtas foriri. Vi devas min helpi, ĉu ne! Mi tuj aperos mizerege ridinda. Pendigon al ĝi, tamen! Mi kuraĝiĝu! Hem!

HASTINGS Bah! homo viva! Nur la unuan atakon faru, kaj ĉio finiĝos! Ŝi nur estas virino, tion vi scias.

- MARLOW** Jes, sed el ŝia sekso, ŝi estas tiu, kiun mi plej timas renkonti.
(venas fraŭlino Hardcastle, ĵus reveninta de promenado, kapvestita, k.t.p.)
- HASTINGS** *(alkondukante Marlon)* Fraŭlino Hardcastle — sinjoro Marlow — Mi fieriĝas konigi, unu al la alia, du personojn tiel meritindajn, kiuj nur bezonas konatiĝi por sin reciproke esti.
- F-INO HARDCASTLE** *(flanken)* — Nun, devige, mi aliros al mia modesta sinjoro, simpluline, kaj tute laŭ sia mieno.
(paŭzo, dum kiu Marlow ŝajnas tre konfuzita)
Mi ĝojas pri via sendanĝera alveno, sinjoro. Mi ĵus aŭdis, ke okazis al vi kelkaj malagrablajoj dum la veturado.
- MARLOW** Nur kelkaj, sinjorino. Jes, ni elportis kelke da ili. Jes, sinjorino, multaj malagrablajoj okazis; sed mi bedaŭrus, — sinjorino, — aŭ, mi volas diri, — mi, kontraŭe, ĝojus pro malbonaj okazoj, kiuj nun tiel agrable finiĝas.
- HASTINGS** *(flanken al li)* Vi neniam parolis pli bone en via tuta vivo. Hem! Tiel daŭrigu, kaj mi promesos al vi venkon.

- F-INO HARDCASTLE** Mi timas, ke vi min flatos, sinjoro. Vi, kiu vidis tiom da distinginda societo, kompreneble trovos nur malgrandan plezuron en nia senfama landaŭgulo.
- MARLOW** *(kuraĝiĝante)* Vere, sinjorino, mi estas vivinta tra la mondo, kiel vi scias; sed mi tre malofte vizitis taŭgan societeton. Mi restis ĝis nun observanto de societa vivo, sinjorino, dum la aliaj homoj ĝin ĝuis.
- F-INO NEVILLE** Sed mi aŭdis, ke tiamaniere, oni fine kapabliĝas ĝin ĝui.
- HASTINGS** *(flanken, al li)* Cicero neniam pli bone parolis. Ree, mi petas, kaj al vi neniam mankos memstaro.
- MARLOW** *(flanken, al Hastings)* Hem! Staru do apud mi; kaj se mi ŝanceliĝos, pruntedonu al mi unu-du vortojn por restarigi min.
- F-INO HARDCASTLE** Tiel bona observanto kiel vi, pri la homivado, mi timas, ofte trovis tian okupadon malagrabra, ĉar kompreneble vi vidis pli da cenzurindaĵo ol laŭdindaĵon.
- MARLOW** Ne, ne, sinjorino, pardonu min. Mi ĉiam pretiĝis por amuziĝo. La malspritaĵo de la plimulto ŝajnas pli ridinda ol malkvietiga.
- HASTINGS** *(al li)* Prave, prave. Neniam vi tiel bone diris dum via tuta vivo. Bone! *(al fraŭlino)*

- Hardcastle*) Fraŭlino Hardcastle, mi vidas, ke vi kaj sinjoro Marlow estos tute komunemaj gekunuloj. Mi pensas, ke nia ĉeesto tie ĉi nur malhelpos al la intervidiĝo
- MARLOW Neniel, Sinjoro Hastings. Kompanion vian ni ŝatas pli ol ĉion. (*al li flanken*) Malbeno! Georgo, vi ne certe foriros, — kiel vi povos nin lasi!
- HASTINGS Nia prokrasto tie ĉi nur malbonigos vian interparoladon. Ni do eliros kaj iros en la proksiman ĉambron. (*flanken al li*) Ĉu vi ne komprenas do, ke ni ankaŭ deziras mallongan privatan intervidiĝon?
- (fraŭlino Neville kaj Hastings foriras)*
- F-INO HARDCASTLE (*post paŭzo*) Sed vi ne tute jam staris kiel observanto, kompreneble, sinjoro; mi konjektas, ke sinjorinoj okaze altiras vian atenton.
- MARLOW (*retiriĝanta*) Pardonu min, sinjorino, sed ĝis nun — mi, mi — mi nur penadis por indiĝi je ili.
- F-INO HARDCASTLE Kaj iuj diras, ke tio estas la plej malbona maniero por ilin gajni.
- MARLOW Eble, sinjorino. Tamen mi amas interparoli kun la plej serioza kaj prudenta parto de hominaro — sed verŝajne mi tedas vin.

F-INO HARDCASTLE Neniel, sinjoro; estas nenio, kion mi tiel amas kiel seriozan interparoladon; mi povus aŭskulti ĝin eterne. Vere, mi ofte miras, kiel sentema homo iam povas admiri tiun specon de malgravaj sensencaj plezuroj, kiu neniam kortuŝas iun.

MARLOW Tio estas animmalsano, sinjorino. Inter diversaj gustoj estas nepre malmultaj, kiuj volus provi ke — ke — hem!

F-INO HARDCASTLE Mi vin komprenas, sinjoro. Estas kompreneble iuj kiuj, ne posedante guston por delikataj plezuroj, pretendas, ke ili malamas tion, kion ili ne povas ŝati.

MARLOW Precize vi ne klarigis mian opinion, sinjorino, sed multege pli klare ol mi . . . kaj mi bezonas rimarki — hem!

F-INO HARDCASTLE (*flanken*) — Kiu povus pensi, ke tia homo okaze maltimiĝas? (*al li*) Vi ĵus diris, sinjoro?

MARLOW Jes, mi ĵus diris, sinjorino — Nu, mi atestas, ke nun mi ne scias, kion mi volis diri.

F-INO HARDCASTLE (*flanken*) Kaj mi ankaŭ certe tion ne scias. (*al li*) Vi ĵus diris, sinjoro, ke en tiu ĉi nia hipokrita epoko — Jes, iom vi diris pri hipokriteco . . .

- MARLOW Jes, sinjorino, en tiu ĉi hipokrita tempo, ne estas multaj, kiuj, post preciza informiĝo, povus . . . ha — ho — —
- F-INO HARDCASTLE Mi vin perfekte komprenas, sinjoro.
- MARLOW *(flanke)* Nu, certe, tio estas pli ol mi povus atesti.
- F-INO HARDCASTLE Vi opinias, ke en tiu ĉi hipokrita nuntempo, estas tute ne multaj, kiuj publike ne mallaŭdas tion, kion ili kaŝeme faras, kaj pensas, ke ili estas virtuloj, se ili nur laŭdas virtecon.
- MARLOW Prave, sinjorino; kiuj buŝe entenas multan virtecon, tiuj malpli da ĝi havas en la brusto. Sed mi certe tedas al vi — —
- F-INO HARDCASTLE Neniel, mi certigas; estos io tiel agrabla kaj fervora en via mieno, tia vigleco, tia forto — Sinjoro, mi petas, daŭrigu.
- MARLOW Jes, sinjorino, mi ĵus penis diri, ke kelkfoje estas okazoj — kiam — absolute senkuraĝeco forigas la tutan . . . kaj translokas iun . . . sur . . . hena!
- F-INO HARDCASTLE Mi tute samopinias kun vi; senkuraĝuloj okaze ŝajnas malsprituloj, kaj eĉ ofte senencaĵon diras, kiam li plej avidas brili — Mi petas, ke vi bonvole daŭrigu, sinjoro.

- MARLOW Jes, moralparolante, sinjorino, tio okazas — Sed mi vidas, ke fraŭlino Neville atendas nin en la apuda ĉambro. Por nenio en la mondo mi volus tedigi.
- F-INO HARDCASTLE Mi atestas, sinjoro, ke neniu pli ol vi amuzis min, en mia tuta vivo. Bonvolu daŭrigi, mi petas.
- MARLOW Jes; mi tuj volis diri, sinjorino — Sed ŝi donas al ni signon por voki nin al si. Ĉu vi permesos, ke mi akompanu vin!
- F-INO HARDCASTLE Nu! mi do tuj sekvos.
- MARLOW *(flanken)* Tiu dialoga platiĝo min tute mal-sprutigis. *(li foriras)*
(fraŭlino Hardcastle, sola)
- F-INO HARDCASTLE Ha! ha! ha! Ĉu iam ebligis tia modesta, sentimentala intervidiĝo? — Mi certigas, ke li apenaŭ rigardis mian vizaĝon dum la tuta tempo. Krom lia neklarigebla hontemo, tamen, li estas belaspekta. Li ankaŭ havas komprenon, sed ĉio estas tiel kaŝita de timemo, ke ĝi tedas pli ol simpla nescio. Se mi povas igi lin esti pli memfida, tio estos fari komplezon al iu, kiun mi bone konas. Sed kiu estas tiu persoho? Ha! Tio estas demando, al kiu kompreneble mi nenion respondos. *(ŝi foriras)*

(venas Tony kaj fraŭlino Neville; sekvas sinjorino Hardcastle kaj Hastings)

TONY Kial do vi min tiel sekvas, kuzino Konjo? Mi miras, ke vi ne hontas je via loga maniero.

F-INO NEVILLE Ĉu vi opinias, kuzo, ke oni ne povas senkulpe paroli al parenco?

TONY Ne; sed mi bone scias, kian specon de parenco vi deziras fari el mi. Tio tamen ne taŭgos. Mi tuj diros al vi, kuzino Konjo, ke tio taŭgos por nenio. Bonvolu do stari for de mi, kiu ne volas havi pli intiman parencecon.

(ŝi kokete sekvas lin al la malantaŭa sceno)

S-INO HARDCASTLE Nu! Mi atestas, Sinjoro Hastings, ke vi estas tre amuza. Nenio en la mondo pli plaĉas al mi ol paroli pri Londono kaj ĝiaj manieroj — kvankam neniam mi estis tie.

HASTINGS Neniam? Vi min miregigas! Ĉar, via maniero kaj mieno, jam konkludigis min ke la plej granda parto de via vivo pasigis aŭ ĉe Ranelagh, en la Kortego de St. James, aŭ sur la Tura riverbordo.

S-INO HARDCASTLE Ho, sinjoro, plaĉas al vi tiel paroli. Ni kamparulinoj ne povas posedi iajn bon-

manierojn. Mi adoras la urban vivon, kaj eble tio igas min superstari al kelkaj niaj najbaraj maldelikatuloj. Sed ne povas ĝentile konduti iu, kiu neniam vizitis la Pantheonon, la Grotĝardenojn, Borough, kaj similajn lokojn, kie la nobelaro precipe kolektiĝas. Ĉio, kion mi nur povas fari, estas ĝui Londonon pere. Mi zorgas ekscii pri ĉiu privata intervidiĝo, el la skandala Gazeto, kaj mi ricevas la modojn, tuj kiam ili aperas, per letero sendata al mi de la du fraŭlinoj Ricket, kiuj loĝas en Crooked Lane. Ĉu vi amas tiun ĉi harfrizaĵon, sinjoro Hastings?

HASTINGS

Altege eleganta kaj delikata ĝi estas, mia-vorte, sinjorino. Via frizisto estas franco, mi supozas?

S-INO HARDCASTLE

Mi certigas, ke mi ĝin elfaris el gravuraĵo kiun mi trovis en la antaŭjara Notlibro por Sinjorinoj.

HASTINGS

Ĉu estas eble? Tia harfrizaĵo, en teatra flankloĝio altirus al vi tiom da rigardoj kiom Ŝia Moŝto la Ĉefurbestrino, en oficiala balo.

S-INO HARDCASTLE

Tutcerte, de la komenco de inokulado, ne estas videbla ia malbelulino. Tial oni de-

vas vesti sin iom zorge, se oni ne volas malvidebliĝi en popolamaso.

HASTINGS

Sed tio neniam okazos por vi, sinjorino, kiamaniere vi preferas vesti vin. (*salutas ŝin*)

S-INO HARDCASTLE

Ĉu tamen mia vestaĵo taŭgas por io, kiam, flanke de mi, staras tia antikvaĵo kia sinjoro Hardcastle. Kion ajn mi povas diri neniam falos eĉ butono de liaj vestoj. Mi ofte petis, ke li demetu sian grandan ŝpinaĵan perukon, kaj ankaŭ ke li pudroplastrigu la senharejojn — kiel faras la landsinjoro Pately.

HASTINGS

Vi estas prava, sinjorino, ĉar kiel inter la sinjorinoj ne estas jam malbelulinoj, tiel, inter viroj, ne estas iaj maljunuloj.

S-INO HARDCASTLE

Sed kion vi pensas, ke li respondis? Nu, per kutima gotika vigleco, li rimarkis, ke mi nur deziras, ke li demetu sian perukon por ĝin aliformigi kiel kapornamon por mi mem.

HASTINGS

Netolereble! je via aĝo vi povas porti tion, kion vi volos; ĉio decas por vi.

S-INO HARDCASTLE

Bonvolu diri al mi, Sinjoro Hastings, kio ma aĝo, laŭ vi, estas plej ŝatata en la ĉefurbo, nun.

- HASTINGS** Antaŭ kelka tempo, kvardekjarulinoj superis, sed mi aŭdis, ke la sinjorinoj intencas, ke kvindekjarulinoj, siavice, altiĝu dum la venonta vintro.
- S-INO HARDCASTLE** Ĉu vere? Mi do estos tro juna por la lasta sekcio.
- HASTINGS** Neniu sinjorino portas juvelojn nun, antaŭ ol ŝi fariĝas postkvardekjara. Ekzemple, la ĉi tiean fraŭlinon oni nur akceptus nun, en ĝentila societo, kiel knabinon, aŭ simple kiel tute junan lernantinon.
- S-INO HARDCASTLE** Kaj tamen Ŝia Nevina Moŝto mia pensas, ke ŝi mem virine staras, kaj tiel ŝatas juvelojn kiel la plej maljuna el ni ĉiuj.
- HASTINGS** Ĉu ŝi estas via nevino? Ĉu mi ankaŭ prave konkludos, ke tiu juna sinjoro estas via frato?
- S-INO HARDCASTLE** Mia filo, sinjoro. Ili ambaŭ estas preskaŭ gefianĉoj. Notu ilian ludetaĵon. Ili intermalpacas kaj reamikiĝas almenaŭ dekon da fojoj ĉiutage, kvazaŭ ili jam estus gedzoj. (*al ili*) Nu, Tony, mia filo, kiajn dolĉajn vortojn vi diris al via kuzino Constance hodiaŭ vespere?
- TONY** Mi diris al ŝi neniun dolĉaĵon, krom ke mi plendis pri ŝia senĉesa akompanado de

mi, kaj tio multe tedas min. Je Dio ne ekzistas nun loko en la domo, kiun mi povas ĝui sola, krom la ĉevalejo.

S-INO HARDCASTLE Ne atentu tion, kion li ĵus diris, kara Konjo. Li alimaniere parolas, tuj kiam vi forestas.

F-INO NEVILLE Tiamaniere, mia kuzo agas grandanime. Li malpaciĝas publike, por ke oni pardonu lin private.

TONY Tion mi ne nomas . . . vero . . . sed la malo de ĝi.

S-INO HARDCASTLE Ha! Li estas kaŝema ruzulo. Ĉu vi ne opinias, ke ili ambaŭ havas similan buŝon, sinjoro Hastings? Blenkinsopa buŝo ĝi estas, akurate! Samkreskitoj ankaŭ. Nu do, dorse dorsen, miaj gebeletuloj, por ke sinjoro Hastings vidu por si mem. Nu, Tony!

TONY Plibone estus ne igi nin — *(ili intermezuras)*

F-INO NEVILLE Ho, li preskaŭ rompis mian kapon!

S-INO HARDCASTLE Ho, vi monstro! Hontu, Tony; viro ne rajtas tiel kondukti.

TONY Viro? Ĉu mi estas plenaĝa? Donu tuj al mi mian heredon. Je Dio, mi ne volas pli longe malspriti.

S-INO HARDCASTLE Ĉu, sendanka knabo, tio estas ĉio, kion mi meritas pro la penadoj, kiujn mi suferis pri via edukado? Mi, kiu dormigis vin en lulilo, kaj nutroplenigis, per kulereto, tiun ĉi vian beletan buŝon? Ĉu mi eĉ ne brodis tiun veŝton por pliĝentiligi vin? Ĉu mi ne preparis ĉiutage kuraciletojn por vi, kaj ploris, dum ili efikadis?

TONY Je Dio, vi havis kaŭzon por plori, ĉar vi min dozplenigis senintermanke de mia naskiĝa tempo. Mi kalkulas, ke vi al mi dekoble glutigis ĉiun ordonaĵon en *La familia Kuracisto*; kaj vi intencas dietigi min laŭ Quincy, kiam venos la printempo. Sed, je Dio, mi tuj diros al vi, ke mi ne volas plu malspritiĝi.

S-INO HARDCASTLE Ĉu, ho vipero, la tuto ne estis por via bonstato? Ĉu ne por via bonsano?

TONY Kore, do, mi deziras, ke vi lasu min aparta kaj mian sanon ankaŭ. Riproĉi min tia maniere, kiam mi sentas min bonhumora! Se ian bonaĵon mi estu havonta, ĝi venu de si mem! Ne daŭrigu senĉese ĝin puŝi kaj repuŝi en min!

S-INO HARDCASTLE Tio estas malvera. Mi neniam vidas vin, kiam vi estas bonhumora. Ne, Tony, ĉar

tiam vi iras ĉu al la trinkejo, ĉu al la hundejo. Ĉu do neniam devas ĉarmi min viaj agrablaj sovaĝaj sonoj, ho kruela monstro?

TONY Je Dio, panjo, viaj sonoj estas pli sovaĝaj ol miaj.

S-INO HARDCASTLE Ĉu oni iam aŭdis tian diron? Sed mi bone vidas, ke li intencas rompi mian koron; jes, mi vidas, ke li tion deziras.

HASTINGS Kara sinjorino, permesu, ke mi iomete admonu la junan sinjoron. Mi certigas, ke mi povos lin plenumigi sian devon.

S-INO HARDCASTLE Nu! Mi do tuj foriros. Venu, Konstanco, amo mia. Sinjoro Hastings, vi vidas mian mizeran situacion. Ĉu iam estis patrino malbenita de tia kara, dolĉa, beleta, malpaca, malobea knabo?

(foriras sinjorino Hardcastle kaj fraŭlino Neville)

Hastings kaj Tony.

TONY *(kantas)* Eliris rajdi juna kavaliro;
Obstine iris li ĝis la deiro.
Kavaliro, rajdu do!

Ne atentu pri ŝi. Ŝi ploru. Tio estas la konsolo de ŝia koro. Mi iafoje vidis ŝin kaj la

fratinon kune plorantajn, pri iu fabelo, dum unu horo; kaj ili rimarkis, ke ju pli la libro plorigas ilin, des pli ili ĝin ŝatas.

HASTINGS Vi do ne estas sinjorinamulo, mi pensas, mia beleta juna sinjoro?

TONY Mi ĵus diris al vi mian opinion pri ili.

HASTINGS Sed ne pri tiu, kiun via patrino elektis por vi! Ŝi ŝajnas al mi beleta, dolĉhumora junulino.

TONY Vi tiel parolas, ĉar vi ne tiel bone kiel mi konas ŝin. Je Dio, mi konas ĉiun colon ĉirkaŭ ŝi, kaj ne ekzistas pli akra, malafabla bufino ol ŝi, en la kristanaro.

HASTINGS (*flanken*) Ha! tre kuraĝiga diro por amemulo!

TONY Mi konas ŝin eĉ de la tempo, kiam ŝi ne estis pli alta ol tio! Ŝi estas petola kiel leporo en arbusto, aŭ ĉevalido la unuan tagon, kiam oni sur ĝi volas rajdi.

HASTINGS Ŝi ŝajnas al mi saĝa kaj silentema.

TONY Jes, kiam ŝi ĉeestas inter nekonatoj. Sed, ĉe siaj kunludantinoj, ŝi krias laŭte kiel porko tra pordego.

HASTINGS Sed ŝia modesta mieno min ĉarmas.

- TONY Jes, sed iomete intencu kontraŭstari ŝian humoron, kaj tuj, per piedfrapo vi forĵetiĝos en kavaĵon!
- HASTINGS Nu, vi konsentos, ke ŝi certe posedas belecon. Jes, vi ne povas tion kontraŭdiri.
- TONY Ĉapelistina arto! Ŝi estas tute artefarita, sinjoro. Ha! se vi nur povus vidi la junulinon Bet Bouncer, en nia najbaraĵo, vi tiam povus paroli pri beleco! Je Dio, ŝi havas paron da okuloj tiel nigraj kiel pruneloj, kaj ŝiaj vangoj estas tiel larĝaj kaj ruĝaj kiel tribuneta kuseno. Ŝi dikegalas du el la alia.
- HASTINGS Nu, kion vi dirus, se amiko volonte prenis sur sin la amaran aferon el viaj manoj?
- TONY Sed kiel?
- HASTINGS Ĉu vi dankos iun, kiu volos preni fraŭlinon Neville, kaj lasos vin feliĉa kun via kara Bet?
- TONY Jes, sed kie estas tia amiko? Kaj kiu volos preni ŝin?
- HASTINGS Mi mem. Se vi nur min helpos, mi tuj forkondukos ŝin en Francujon, kaj vi neniam poste aŭdos pri ŝi.

TONY Vin helpi! Je Dio, mi volas kaj volos, ĝis la lasta guto de mia sango. Mi tuj jungos paron da ĉevaloj al via kaleŝeto, kiuj forruligos vin en la daŭro de palpebrumo; kaj eble mi povos kapti por vi parton de ŝia juvelaro, pri kiu vi eĉ ne songas.

HASTINGS Kara bienestro, vere en tio ĉi vi ŝajnas juna bravulo.

TONY Venu do kun mi; mi montros al vi plimulte da vera maltimo, antaŭ ol ni interdiros adiaŭ.

(kantas) Ĉar ni bravuloj estas,
De tondra paflego
La bruo, ni atestas,
Fariĝos ne timego!

(Ili foriras)

TRIA AKTO

SCENO 1

Salono en kampara domo.

(Venas sinjoro Hardcastle)

S-RO HARDCASTLE Kion ajn igis mian malnovan amikon Sir Charles rekomendi sian filon kiel la plej modestan junulon en la ĉefurbo? Al mi li ŝajnas la plej senhonta bronzfrunta petolulo, kiu iam parolis per lango. Li jam tuj kaptis la apogseĝon apud la fajrejo. Li demetis siajn botojn en la salono, kaj postulis, ke mi zorgos pri ili. Mi tre deziras scii, kion lia senhontemo efektivigis kun mia filino. Certe, ŝi tre ofendiĝos je ĝi.

(venas fraŭlino Hardcastle simple vestita)

S-RO HARDCASTLE Nu, mia Kotinjo, mi vidas, ke, laŭ mia konsilo, vi ĵus ŝangis vian veston; mi tamen kredas, ke tio ne estis tre necesa.

F-INO HARDCASTLE Mi, sinjoro, trovas tian plezuron obei viajn ordonojn, ke mi zorgas ilin obei sen-

ŝancele, kaj neniam haltas por pripensi, ĉu ili estas pravaj.

S-RO HARDCASTLE Kaj tamen, Kotinjo, mi iafoje donas al vi motivon ŝanceligi, precipe hodiaŭ, kiam mi rekomendis mian modestulon al vi kiel amonton.

F-INO HARDCASTLE Vi min informis, ke mi esperu ion eksterordinaran, kaj mi trovas, ke la originalo tre superas la priskribon.

S-RO HARDCASTLE Mi neniam tiel miregigis en mia vivo? Li tute konfuzas miajn kapablojn!

F-INO HARDCASTLE Mi neniam vidis similaĵon! Kaj tamen li estas societamulo!

S-RO HARDCASTLE Jes, certe li lernis la tuton eksterlande. Kia naivegulo estas mi pensante, ke junulo povus akiri modestecon per migriĝo! Tute tiel facile povus li spritigi en maskitaro!

F-INO HARDCASTLE Tio ŝajnas simple natura por li.

S-RO HARDCASTLE Sed malbona komunemeco kaj, kompreneble, franca dancinstruisto helpis al la akiro.

F-INO HARDCASTLE Kion? Certe, vi eraras, patreto! Franca dancinstruisto neniam povus akirigi al li tian timeman rigardon — tian senartan diron — tian modestan mienon — —

S-RO HARDCASTLE Infanino! kies rigardon? kies mienon?

- F-INO HARDCASTLE** Kies? Mi certe parolas pri sinjoro Marlow. Lia hontemo, lia timemo tuj mirigis min de la unua renkonto.
- S-RO HARDCASTLE** Viaj okuloj do erare lin vidis, ĉar li ŝajnas al mi esti la plej senhonta bronzfrunta petolulo, kiu iam mirigis miajn sentojn.
- F-INO HARDCASTLE** Sinjoro, vi certe mokas! Mi neniam vidis tian modestulon!
- S-RO HARDCASTLE** Vi ne serioze parolas, ĉu! Mi neniam vidis, de mia naskiĝo, tian memfidegan multimeman hundidon! Eĉ la fanfarona Dawson ŝajnus nur naivegulo apud li!
- F-INO HARDCASTLE** Mirigaĵo! Li venis al mi respekteme salutanta, kun balbuta voĉo, kaj malsuprena rigardo.
- S-RO HARDCASTLE** Li proksimiĝis al mi laŭtparolante, arogante, kaj lia senĝenemo tute frostigas mian sangon.
- F-INO HARDCASTLE** Ho! li agis kun mi timeme, respekteme; li mallaŭdis la nuntempajn kutimojn, admiris la saĝecon de knabinoj, kiuj neniam ridas; tedis min per petoj, ke mi senkulpigu lian tedecon; tiam li eliris el la ĉambro kun saluton kaj: "Sinjorino, mi ne volus, por io en la mondo, vin deteni."

S-RO HARDCASTLE Sed, kontraŭe, li alparolis min kvazaŭ mi estus konatulo sia, dum lia tuta antaŭa vivo; faris dudekon da demandoj, kaj ĉe neniam atendis respondon; interrompis ĉe mian plej bonan rimarkon per ia sen-senca ŝerco, fine, en la mezo de mia plej rimarkinda historieto pri la dukino de Marlborough kaj princo Eugeno, li subite demandis senhonte, ĉu mi estas spertulo por miksi punĉon! Jes, Kotinjo, li demandis ĉu via patro estas punĉfaristo!

F-INO HARDCASTLE Ha! Unu el ni certe devas erari!

S-RO HARDCASTLE Se li estas tia, kia li montras sin al mi, mi tute decidus, ke li neniam havos mian konsenton!

F-INO HARDCASTLE Kaj se li vere estas la nubema objekto, kiun mi vidis, li neniam havos mian.

S-RO HARDCASTLE Nu, do, pri unu punkto ni interkonsentas, nome, lin rifuzi!

F-INO HARDCASTLE Jes; sed kondiĉe. Ĉar, se vi lin trovos malpli senhonta, kaj mi pensos, ke li estas pli kuraĝema; se vi trovos lin pli respektama, kaj se li ŝajnos al mi pli urĝiga — mi ne povas diri — ĉar, post ĉio, li tute ne estas maltaŭga kiel viro. Certe ni ne renkontas

multajn similulojn en la kampara ĉevalkurado.

S-RO HARDCASTLE Kiel vi ĵus diris, se ni lin trovos pli aŭ malpli — Sed ne estas eble. La unua vidiĝo konvinkis min. Mi malofte eraras en miaj impresoj.

F-INO HARDCASTLE Kaj tamen multe da bonaj ecoj povas kaŝiĝi sub la unua ŝajno.

S-RO HARDCASTLE Ha! kiam knabino pensas, ke ŝi iom amas la eksterajon de individuo, ŝi tuj penadas por diveni lian ceteran enhanceblecon. Por ŝi, ebena vizaĝo signifas prudentecon, kaj ĝentila figuro ĉiun virton.

F-INO HARDCASTLE Mi fidas, sinjoro, ke interparolo, kiun vi komencis per gratulo al mia prudenteco, ne finiĝos per mokado de mia kompreneco.

S-RO HARDCASTLE Pardonu min, Kotinjo. Sed se sinjoro Bronzfruntulo povos trovi rimedon por kunpacigi la kontraŭaĵojn, li eble povas plaĉi al ni ambaŭ.

F-INO HARDCASTLE Kaj, ĉar unu el ni certe eraris, ĉu ni ne tuj klopodu por eble elfari aliajn eltrovojn?

S-RO HARDCASTLE Ha, fidu al mi, mi estas prava.

F-INO HARDCASTLE Kaj fidu al mi, mi malofte estas malprava.

(ili foriras)

(venas Tony alkuranta, kun juvelujo en la mano)

TONY

Je Dio, mi ĵus kaptis ilin! Jen ili estas. Kuzino Konjo, viaj ĉirkaŭkoloj, orelingoj, kaj cetero! La patrino ne pli longe friponos la gemalfeliĉulojn el ilia posedaĵo. Ho! mia genio, ĉu estas vi?

(venas Hastings)

HASTINGS

Kara amiko mia, kiel vi agis kun via patrino, en la afero? Mi fidas, ke vi vin amuzis per ŝajnigo de amo al via kuzino, kaj ke vi nun estas pretaj por kunpaciĝi. Niaj ĉevaloj estos sufiĉe ripozintaj, post mallonga tempo, kaj ni tuj pretiĝos por forveturi.

TONY

Kaj jen estas io, kio helpas vin por pagi la vojaĝajn elspezojn. *(prezentas la juvelujon)* La juveloj de via fianĉino. Zorgu pri ili, kaj pendigu tiun, kiu volus ŝteli de vi unu el ili!

HASTINGS

Sed kiel vi elturniĝis por devigi vian patrino doni ilin al vi?

TONY

Ne faru demandojn kaj mi ne diros malverojn. Mi kaptis ilin per dikfingra turno. Se mi ne havus ŝlosilon por ĉiu tirkesto en la skribtablo de la patrino, kiel mi povus vizitadi la trinkejon tiel ofte kiel mi faras?

Honestulo povas rajte ŝteli de sia propra posedaĵo; ĉu ne?

HASTINGS

Certe, kaj miloj tion faras ĉiutage. Sed mi bezonas klarigi ĉion al vi. Fraŭlino Neville, en la nuna horo, penas por ke ŝia onklino bonvole ilin donu al ŝi. Se ŝi sukcesos, tio estos, mi pensas, la plej delikata maniero por atingi la celon.

TONY

Nu, zorgu pri ili ĝis la tempo, kiam vi sciigos, kiel ŝi sukcesos. Mi jam scias, kian sukceson ŝi havos. La patrino, prefere ol senigi sin de la juveloj, donus la solan sanan denton, kiun ŝi havas en la buŝo.

HASTINGS

Sed mi timas la rezulton de ŝia kolero, kiam ŝi ekscios, ke ŝi ilin jam perdis.

TONY

Ne atentu ŝian koleron. Lasu al mi la kondukon de la afero. Mi ne taksas ŝian koleron pli ol pafon de petardo. Diablo! Jen ili venas. Forsaltu! Forkuru!

(foriras Hastings)

(Tony, sinjorino Hardcastle, fraŭlino Neville)

S-INO HARDCASTLE

Vere, Constance, vi min mirigas. Ĉu knabineto kiel vi bezonas juvelojn? Estos sufiĉe frua tempo, se vi portos juvelojn post

dudek jaroj de nun, kiam vi bezonos plibonigi vian belecon.

F-INO NEVILLE

Sed tio, kio povus plibonigi kvardekjaran belecon, sinjorino, certe estus ornamo por dudekjarulino.

S-INO HARDCASTLE

Via beleco, kara mia, bezonas nenian ornamon. Tia natura floro superas milon da ornamaĵoj. Cetere, knabino mia, juveloj ne plu estas laŭmodaj nun. Ĉu vi ne vidas, ke duono da niaj konatulinoj, ŝia sinjorina Moŝto Lumstriad', kaj sinjorino Ĉifant'in', kaj ceteraj, sendas sian juvelaron al la urbo kaj nur portas imitaĵojn kaj markasitojn.

F-INO NEVILLE

Sed, kiu scias ĉu iu, kiun mi ne nomos, ne preferus min portanta mian tutan beliĝeton?

S-INO HARDCASTLE

Konsiliĝu kun via spegulo, kara, kaj tiam vidu ĉu, kun helpo de tia okulparo, vi bezonas pli bonajn brilegilojn. Kion vi opinias, Tony, karulo? Ĉu via kuzino Konjo bezonas juvelojn por pligrandigi sian belecon antaŭ viaj okuloj?

TONY

Tio dependas detio, kio sekvos.

F-INO NEVILLE

Kara onklino, se vi nur sciuz, kiel vi min kontentigus, se . . .

S-INO HARDCASTLE Nur pakaĵo da malnovmodaj rozaj kaj tabultranĉaĵoj. Ili igus vin aspekti tute kiel reĝo Salomono ĉe marionetscenejo. Cetero mi kredas, ke mi ne facile trovus ilin. Ili eble estas perditaj: mi ne povus diri, ĉu jes, ĉu ne.

TONY (*flanken al sinjorino Hardcastle*) Kial do vi ne diras tuj al ŝi? Vi vidas, ke ŝi avide deziras ilin. Diru al ŝi, ke ili estas perditaj. Estas tio la plej simpla maniero trankviligi ŝin. Diru, ke ili estas perditaj, kaj prenu min kiel atestanton.

S-INO HARDCASTLE (*flunken al Tony*) Vi bone scias, karulo, ke mi nur konservas ilin por vi. Tial, se mi diros, ke ili tute mankas, vi tuj estos mia atestanto, hi! hi! hi!

TONY Do, nenion timu. Je Dio, mi tuj diros, ke per miaj propraj okuloj mi vidis ilin foriĝi.

F-INO NEVILLE Mi nur deziras porti ilin dum unu tago, sinjorino; nur permesu al mi ilin montri kiel sanktrestaĵon, kaj tiam vi povos ilin denove enfermi.

S-INO HARDCASTLE Nekaŝeme, kara Konstanco, se mi povus ilin trovi, tuj vi havus ilin. Sed mi ne scias, kie ili estas, mi certigas. Eble ili estas per-

ditaj. Sed ni devas pacienci, kie ajn ili troviĝas.

F-INO NEVILLE Tion mi ne povas kredi. Tio estas nur artifiko por rifuzi mian peton. Mi scias, ke ili estas tro valoraj, por ke vi ne zorge ilin konservu, kaj, ĉar vi respondecas pri ili, se okazos perdo.

S-INO HARDCASTLE Ne maltrankvilu, Konstanco; se ili perdiĝis, mi nepre devos redoni al vi ekvivalentaĵon. Sed mia filo bone scias, ke ili estas perditaj, aŭ almenaŭ netroveblaj.

TONY Tion mi povas atesti; ili estas forigitaj, kaj netroveblaj: tion mi tuj ĵuros.

S-INO HARDCASTLE Vi devas submetiĝi, kara mia, ĉar, kvankam ni perdis nian posedaĵon, ni ne devus tamen perdi paciencon. Rigardu min, kiel trankvila mi estas.

F-INO NEVILLE Jes, oni ĝenerale povas trankvile vidi la malfeliĉon de aliaj.

S-INO HARDCASTLE Nu, mi miras, ke saĝa knabino, kiel vi ŝajnas, donas penson al tia bagatelo! Ni baldaŭ trovos ilin, kaj, dume vi povos uzi miajn grenatojn ĝis la tempo, kiam via juvelaro estos trovita.

F-INO NEVILLE Mi abomenas grenatojn!

S-INO HARDCASTLE Ili estas la plej decaj objektoj en la mondo por efikigi klaran vizaĝkoloron. Vi ofte vidis, kiel bele ili aspektas sur mi. Vi certe havos ilin! (*foriras*)

F-INO NEVILLE El ĉiuj objektoj mi plej malamas ilin! (*al Tony*) Vi ne foriru. Ĉu iam okazis io pli ĉaĝreniga? Perdi miajn personajn juvelojn, kaj devigi min porti ŝian rubon!

TONY Ne estu malsaĝa! Se ŝi donos al vi la grenatojn, prenu ĉion, kion ŝi donos. La juveloj jam estas viaj. Mi ŝtelis ilin el ŝia skribtablo nesciate de ŝi. Forkuru al via amanto; li diros al vi plue pri la afero. Lasu al mi la sekvon.

F-INO NEVILLE Kara kuzo mia!

TONY Malaperu! Ŝi venas, kaj jam eltrovis, ke la nest oja ne estas tie. (*foriras fraŭlino Neville*) Dimorto! Kiel ŝi movias kaj fajreriĝis simile al artfajroj!

(*venas sinjorino Hardcastle*)

S-INO HARDCASTLE Ĥaoso! Ŝtelistoj! Rabado! Ni estas rabegitaj, ruinigitaj, domperdintaj! Senigitaj!

TONY Kio okazis? Kio estas, patrinjo? Mi fidas, ke neniu malbonaĵo okazis por iu el la bona familio!

- S-INO HARDCASTLE** Ni estas rabe ruinigitaj! Mian skribtablon oni perforte malŝlosis, forprenis la juvelaron, kaj mi estas senigita!
- TONY** Nur tio! ha! ha! ha! Per ĉiuj legoj, mi neniam vidis ion plej bone agata en mia vivo! Je Dio, mi ĵus pensis, ke vi estus entute malriĉigita! ha! ha! ha!
- S-INO HARDCASTLE** Sed, knabo, mi vere estas malriĉigita, vere. Mian skribtablon oni perforte malŝlosis, kaj ĉion oni forprenis.
- TONY** Jes, daŭrigu tion rakonton, ha! ha! ha! daŭrigu ĝin; mi estos via atestanto, alvoku min, mi ĵuros pri tio!
- S-INO HARDCASTLE** Mi atestas, Tony, per ĉio plej kara, ke la juvelaro estas forigita, kaj mi por ĉiam estos senigita.
- TONY** Certe, mi scias, ke ĝi estas forigita, kaj mi devos tion diri.
- S-INO HARDCASTLE** Mia karega Tony, aŭskultu min. Mi ripetas, ke la juveloj ne estas plu en mia posedo.
- TONY** Per ĉiuj legoj, patrino, vi igas min ridi: ha! ha! ha! Mi bone konas tiun, kiu forprenis ilin, ha ha! ha!
- S-INO HARDCASTLE** Ĉu iam oni vidis tian naivegulon, kiu ne povas distingi inter ŝerco kaj graveco? Mi

atestas al vi, ke mi serioze parolas, mal-spiritulo!

TONY Prave, prave! Vi daŭrigu tiel, koleregŝajne, kaj tiam neniu suspektos iun el ni. Mi ja atestos, ke ili forestas.

S-INO HARDCASTLE Ĉu iam ekzistis tia kontraŭa bruto? Li ne volas min aŭdi! Ĉu vi ankaŭ povas atesti ke vi estas ne pli sprita ol idioto? Ĉu malfeliĉa virino povus esti pli ĉagrenata ol mi de frenezuloj unuflanke, kaj de ŝtelistoj aliflanke?

TONY Tion mi povas atesti.

S-INO HARDCASTLE Denove atestu, naivegulo, kaj mi tuj forsendos vin el la ĉambro. Mia malfeliĉa nevino! Kio fariĝos el ŝi? Ĉu vi kuraĝas ridi, vi sensentema bruto, kvazaŭ vi ĝojus je mia mizerego!

TONY Tion mi povas atesti.

S-INO HARDCASTLE Ĉu vi insultas min, monstro? Mi tuj instruos vin ĉagreni vian patrinon; mi tion faros, tuj!

TONY Tion ankaŭ mi povas atesti.

(li rapide foriras, ŝi lin sekvas)

(venas fraŭlino Hardcastle kaj servistino)

F-INO HARDCASTLE Kia nekomprenebla kreitaĵo estas tiu mia frato! Sendi ilin al la domo kiel al gastejo,

ha! ha! Mi nun ne miras pri lia senhontemo.

SERVISTINO Sed plue, sinjorino, la juna sinjoro ĵus kiam vi pasis en via nuna vesto, demandis al mi, ĉu vi estas la kelnerino? Li erare pensis, ke vi estas kelnerino, sinjorino.

F-INO HARDCASTLE Ĉu eble? Mi do vere decidis kuraĝigi la eraron. Diru al mi, Pimple, ĉu vi amas mian nunan robon? Ĉu vi ne pensas, ke mi iom aspektas kiel Ĉerizo en la "Kuzo de Belulo"?

SERVISTINO Estas tia robo kiun ĉiu sinjorino portas en la kamparo, krom kiam ŝi vizitas, aŭ gastigas amikojn.

F-INO HARDCASTLE Kaj vi certas, ke li ne memoras mian vizaĝon aŭ figuron?

SERVISTINO Mi tion certas.

F-INO HARDCASTLE Tion ankaŭ mi pensis; ĉar kvankam ni ambaŭ interparolis dum kelka tempo, tamen, lia timeco tiel aperis, ke li neniam rigardis min dum la intervidiĝo. Vere, se li tion estus farinta, mia ĉapelo ŝirmis min, kaj li ne povis vidi min.

SERVISTINO Sed, kion vi antaŭvidas, se vi kuraĝigos lian eraron?

F-INO HARDCASTLE Nu, unue mi estos videbla, kaj tio ne estas senprofita, kiam knabino havas montreblan vizaĝon. Tiam, eble mi konatiĝos kun iu, (ne malgranda venko estus super tiu), kiu neniam malkaŝeme parolas, krom kun ordinaraj virinoj. Sed mia precipa celo estas ruze insidi la sinjoron, tiel ke, kiel nevidebla probatalanto de romano, mi eksploros la fortojn de la giganto, antaŭ ol oni ekbatalos.

SERVISTINO Sed, ĉu vi mem fidas, ke vi povos plenumi la rolon, alitonigi vian voĉon, tiel ke li ne rekonos ĝin, kiel li ne plu memoras vian mienon!

F-INO HARDCASTLE Ho; ne timu. Mi pensas, ke mi iom konas trinkejesprimojn- — Ĉu Via Moŝto deziras ion? — Servu la Leonon, tuj! — Pipojn kaj tabakon al la Anĝelo! — La Ŝafido kriadis petolege dum duonhoro, atentu!

SERVISTINO Tio taŭgos, certe, sinjorino. Sed jen li venas. *(foriras servistino)*
(venas Marlow)

MARLOW Kia kriadado en ĉiu parto de la domo! Apenaŭ mi ĝuas unu minuton da ripozo. Se mi eniras la salonon, tie mi trovas mian gastejstron kaj lian neeviteblan rakon-

ton, se mi forkuras en la galerion, tie min atendas la gastejestrino riverencanta profundege. Mi tamen havas nun momenton dum kiu, solece, mi povas rememorigi. *(pripenseme ekmarŝas)*

F-INO HARDCASTLE Ĉu vi ĵus vokis, sinjoro? Ĉu via Moŝto deziras ion?

MARLOW *(pripenseme)* Pri fraŭlino Hardcastle, ŝi estas tro serioza, kaj tro sentimentala por mi.

F-INO HARDCASTLE Ĉu via Moŝto ĵus vokis? *(ŝi sin lokas antaŭ li)*

MARLOW *(sin fortunante)* Ne, knabino. *(pripenseme)* Cetere, laŭ la vido, kiun mi havis de ŝi, ŝajnas al mi, ke ŝi strabas.

F-INO HARDCASTLE Mi certigas, sinjoro, ke mi aŭdis la sonorileton.

MARLOW *(pripenseme)* Mi kontentigis la patron, tamen, veninte tien ĉi; kaj morgaŭ mi memkontentiĝos per returno hejmen. *(elprenas sian paperujon kaj legas)*

F-INO HARDCASTLE Eble la alia sinjoro vokis, sinjoro.

MARLOW Ne, mi ripetas al vi.

F-INO HARDCASTLE Mi tre dezirus scii, sinjoro. Ni havas tian mallertularon da servistoj tie ĉi . . .

- MARLOW Ne, ne, mi ripetas. *(li plene ŝin rigardas)*
Jes, knabino, mi pensas nun ke mi ĵus vokis. Mi bezonas — mi bezonas — Per mia vorto, knabino, vi estas vera belulino.
- F-INO HARDCASTLE Ho, sinjoro, nu, vi tuj igos min honti.
- MARLOW Mi neniam vidis pli ageme ruzajn okulojn!
— Jes, jes, mia kara, mi ja vokis por demandi . . . ĉu vi havas nun iom da via . . . ”kio-ajn-ĝi-estas ” en la domo?
- F-INO HARDCASTLE Nenian, sinjoro; ni soniĝis je ĝi tute, de dek tagoj.
- MARLOW Oni do povas viziti tiun ĉi domon tre maloportune, mi opinias. Nu, ekzemple, se mi (nur por proveto) petas por gustumeto de via lipnektaro, eble ankaŭ mi malkontentiĝos.
- F-INO HARDCASTLE Nektaro! nektaro! Tio estas fremda likvoro, pri kiu ni neniam havas mendojn en nia regiono. Ĉu ĝi estas franca likvoro? Ni ne tenas francajn likvorojn tie ĉi, sinjoro.
- MARLOW Ne, ne; tio estas bona angla kresko, mi certigas.
- F-INO HARDCASTLE Kiel strange do, ke mi ĝin ne konas! Ĉiu-specaj anglaj vinoj estas faritaj en tiu ĉi domo, kie mi loĝas jam de dekok jaroj, kaj — —

- MARLOW Jam de dek ok jaroj! Kion? Oni pensus kvazaŭ, knabino, vi komencis trinkejteni eĉ antaŭ ol vi naskigis. Kioman agon havas vi do!
- F-INO HARDCASTLE Ha, sinjoro, mi ne devas konigi mian aĝon! Oni diras, ke virinoj kaj ankaŭ muziko neniam devas datiĝi.
- MARLOW Se mi divenu de tiu ĉi granda interspaco, mi pensus, ke vi ne estas multe pli ol kvardekjara, sed (*alproksimiĝas*) de pli proksime, tamen, mi ne plu kredas, ke vi estas tiel aĝa. (*alproksimiĝas*) Kiam oni venas tre proksime al iuj virinoj, ili ŝajnas eĉ pli junaj; sed se oni venas tute apude . . . (*intencas ŝin kisi*)
- F-INO HARDCASTLE Haltu, mi petas, sinjoro, kaj staru en via propra loko. Al mi preskaŭ ŝajnas, ke vi deziras koni ies aĝon sammaniere, kiel oni agas pri ĉevaloj; mi volas diri . . . per buŝmarko.
- MARLOW Mi certigas, knabineto, ke kun mi vi agas tre malafable. Se vi tenas min tiel malproksime, kiel ni povos nin reciproke konatiĝi!
- F-INO HARDCASTLE Konatiĝi? Nu! kiu do deziras konatiĝi kun vi! Ne mi, mi atestas. Ha, mi bone scias, ke

vi ne tiel senhonte agis kun fraŭlino Hardcastle, kiam ŝi ĵus staris tie ĉi. Mi certigas, ke en ŝia ĉeesto vi ŝajnis tute timigita, senĉese kaj profunde riverencanta; kaj vi balbuteme parolis kun ŝi, tute kiel vi alparolus pacojuĝiston!

MARLOW

(flanken) Mirege ŝi ĵus detalis mian idio-taĵon! *(al ŝi)* Timigita de ŝi, malgracia strabulino! Ne! ne! vi certe ne min konas. Mi sidis kaj kaŝe mokis ŝin iomete, ĉar mi ne volis ŝajni tro severa: ne, mi ne povis min montri tute severa.

F-INO HARDCASTLE

Mi do, sinjoro, rigardos vin kiel favoriton inter sinjorinoj.

MARLOW

Jes, mia kara, ilia tre granda favorito mi estas, kaj tamen, mi pendu, se la kialon de tio mi povas kompreni. En la ĉefurbo, ĉe la sinjorina klubo, oni min nomas la agrabla Kraketil. Kraketil ne estas mia nomo, knabineto, sed tiu, per kiu mi tie estas konata. Mia propra nomo estas Solomons. sinjoro Solomons, kara mia, preta por vin servi. *(volas ŝin kisi)*

F-INO HARDCASTLE

Haltu, sinjoro; vi ne estis kondukanta min al vi mem, sed al via klubo. Vi do estas granda favorito tie, ĉu ne?

- MARLOW Jes, kara mia. Tie ĉiunokte venas sinjorino Virkaptil, mylady Betty Nebulem, la grafino de Kaŝem, sinjorino Longkorna, la maljuna Bidy Kapriol, kaj, kun via humila servisto, ili humore gajigas la kunvenojn.
- F-INO HARDCASTLE Jes, mi pensas, ke devas esti tre gaja loko.
- MARLOW Ho, tiel gaja kiel ludkartoj, noktomanĝoj, vino, kaj maljunulinoj povas ĝin fari.
- F-INO HARDCASTLE Precipe kun la helpo de agrabla Kraketil, ha, ha, ha!
- MARLOW (*flanken*) Nu, mi ne tute ŝatas tian junulineton, ŝi ŝajnas multe tro sperta. (*al ŝi*) Vi ridas, knabino?
- F-INO HARDCASTLE Jes, ĉar mi ĵus pensis, kiom da tempo tiaj virinoj povas dediĉi al dommastraĵo kaj familio.
- MARLOW (*flanken*) Bone! Ŝi ne mokis min. (*al ŝi*) Ĉu vi iafoje laboras, knabino?
- F-INO HARDCASTLE Sendube. Ne estas unu ŝirmilo aŭ eĉ litkovrilo en la domo, kiu ne pruvos tion.
- MARLOW Mirego! Certe vi tuj montros al mi vian brodaĵon, ĉar mi mem iomete brodas kaj eĉ desegnas brodmodelojn. Se vi bezonas kompetentulon por ekzameni vian laboron, turnu vin al mi. (*kaptas ŝian manon*)

- F-INO HARDCASTLE** Sed, la koloroj ne bele ŝajnas en kandel-lumo. Vi ĉion vidos morgaŭ matene.
(penadas por sin liberigi)
- MARLOW** Kial ne nun, mia anĝelo? Tia beleco staras eksterlime de kontraŭbatalo . . . Mal-feliĉo! la patro mem! Ho mia malfavora sorto! *(foriras)*
(venas sinjoro Hardcastle tute mirigita)
- S-RO HARDCASTLE** Tiel do, fraŭlino, tiel do mi trovas vian modestan aspiranton! Tiu estas la humila adoranto, kies okuloj nur rigardas mal-supren, kaj nur admiras respekteme, mal-proksime. Kotinjo, Kotinjo, ĉu vi ne hontas tiamaniere trompi vian patron?
- F-INO HARDCASTLE** Neniam fidu al mi, kara paĉjo, se li ne ankoraŭ estas la modestulo, kiu unue sin el-montris al mi; vi mem konvinkiĝos pri tio, simile al mi.
- S-RO HARDCASTLE** Per la mano de mia korpo, mi pensas, ke lia senhontemo vin infektas! Ĉu mi ne ĵus vidis lin kaptanta vian manon! Ĉu mi ne vidis lin manpreni vin tute, kiel melkistinon? Kaj nun vi parolas pri lia modesteco, kaj respekto; ho!
- F-INO HARDCASTLE** Se mi tamen konvinkos vin baldaŭ, ke li estas modesta, ke li nur havas kulpetojn,

kiuj poste malaperos, kaj virtojn, kiuj ankaŭ pligrandiĝos, mi esperas, ke vi lin pardonos.

S-RO HARDCASTLE Knabino, vi preskaŭ min frenezigas. Mi ripetas, fraŭlino, ke mi ne konvinkiĝos, ĉar mi jam konvinkiĝis. Apenaŭ tri horojn li estas en la domo, kaj jam li anstataŭas min en ĉiu privilegio. Vi eble amas lian senhontemon, kiu por vi estas modesteco, sed bofilo mia bezonas posedi tute malsimilajn ecojn!

F-INO HARDCASTLE Sinjoro, mi nur postulas tiun ĉi nokton por vin konvinki.

S-RO HARDCASTLE Vi ne havos duonon da tia daŭro, ĉar mi intencas lin forsendi en la nuna horo.

F-INO HARDCASTLE Nu, mi nur petas pri unu horo, kaj esperas, ke mi vin kontentigos.

S-RO HARDCASTLE Bone; estu unu horo. Sed mi ne eltenos friponaĵon aŭ ŝercadon. Bele, kaj senkaŝe! Vi komprenas, ĉu ne?

F-INO HARDCASTLE Mi fidas, sinjoro, ke vi ĉiam vidis min fiera, kiam mi obeis viajn ordonojn; ĉar por mi vi estas tiel bona, ke devo kaj emo similiĝas, tute. (*ili foriras*)

KVARA AKTO

SCENO 1

En salono de kampara domego.

(Venas Hastings kaj fraŭlino Neville)

HASTINGS Vi mirigas min! Sir Charles Marlow estas atendata ĉi tie, ĉi vespere? Kie vi ricevis tiun informon?

F-INO NEVILLE Estas tute certe. Mi ja vidis lian leteron al sinjoro Hardcastle, en kiu li anoncas sian intencon foriri nur kelkajn horojn post sia filo.

HASTINGS Ĉio bezonas do, mia Konstanjo, esti preta antaŭ lia alveno. Li min konas, kaj se li trovos min tie ĉi, li sciigos mian nomon kaj eble miajn intencojn al la ceteranoj de la familio.

F-INO NEVILLE Mi fidas, ke la juveloj estas nun taŭge lokitaj.

HASTINGS Jes, jes; mi sendis ilin al Marlow, kiu gardas la ŝlosilojn de nia pakaĵo. Dume mi tuj iros pretigi ĉion por nia forkuro. Via kuzo

ĵus promesis novan paron da ĉevaloj; kaj, se mi ne vidos lin, mi tuj skribos por doni al li aliajn detalojn. *(foriras)*

F-INO NEVILLE

Nu, sukceso sekvu vin! Dume, mi tuj iros por amuzi mian onklinon per mia amŝajno al mia kuzo.

(foriras)

(venas Marlow; servisto lin sekvas)

MARLOW

Mi miregas, kion Hastings intencis, kiam li sendis al mi tian valoraĵon kiel juvelujon por ĝin gardi; ĉar li scias, ke la sola loko, en kiu mi povus ĝin meti, estas la veturil-subsidejo ĉe la gastejporde! Ĉu vi lasis la juvelujon kun la gastejestrino? Ĉu vi akurate metis ĝin en ŝiajn proprajn manojn, kiel mi ordonis?

SERVISTO

Jes, via Moŝto.

MARLOW

Ŝi diris, ke ŝi gardos ĝin zorgeme, ĉu ne?

SERVISTO

Jes, ŝi certe diris, ke ŝi gardos ĝin zorge; ŝi ankaŭ demandis, kiamaniere mi ĝin kaptis; eĉ aldonante, ke ŝi tre dezirus perforte devigi min tion diri.

(foriras la servisto)

MARLOW

Ha! ha! ha! la juvelujo tamen estos bone zorgata. Sed, inter kia nekomprenebla kreitaĵaro ni nin trovas tie ĉi! Tiu kelneris-

tineto ankaŭ, malgraŭ ĉio, strange kirliĝas en mia kapo, kaj tute forpelas la absurdaĵojn de la ceteranoj. Mia ŝi estos, jes, aŭ mi multe eraras.

(venas Hastings)

HASTINGS

Benojn al mi! Mi tute forgesis diri al ŝi, ke mi intencas pretiĝi ĉe la ĝardenekstremaĵo . . . Ha! jen estas Marlow, kaj eĉ bonhumora li ŝajnas.

MARLOW

Min gratulu, Georgo! Kronu, kovru min per laŭroj! Nu, Georgo, malgraŭ ĉio, ni modestuloj ne bezonas vane sopiri pri sukceso kun virinoj.

HASTINGS

Kun kelkaj el ili, mi pensas. Sed per kia speco de sukceso via Modesta Moŝto jam sin kronis, ke vi senhonte tiel fanfaronas pri tio?

MARLOW

Ĉu vi ne vidis la ĉarman, viglan, amindan junulineton, kiu kuras tra la domo, portante ŝlosilfaskon ĉe sia zono?

HASTINGS

Jes; sed kio sekvas?

MARLOW

Kio? Ho vi petolulo! Ŝi estas mia. Tiaj fajre rapidmovaj okuloj, tiaj lipoj! sed ŝi tamen ne permesis, ke mi salutus ilin per kiso.

HASTINGS

Sed, ĉu vi tute fidas, ke ŝi vin amas?

- MARLOW Kion? Homo viva, aŭskultu; ŝi eĉ proponis, ke mi supreniru por ekzameni ŝian brodaĵon kaj plibonigi la desegnon.
- HASTINGS Vi sendube zorgis pri la juvelujo, kiun mi sendis, por ke vi taŭge kaj ŝlosile ĝin tenu? Ĝi estas nun lokita sendanĝere, ĉu ne?
- MARLOW Jes, jes; ĝi estas konvene lokita; mi zorgis pri tio. Sed kiel vi povis pensi, ke kaleŝsubseĝo estus por ĝi sendanĝera loko? Ho, malsaĝulo! Mi pli bone prizorgis tion ol vi mem pensis, ĉar . . .
- HASTINGS Kion?
- MARLOW Mi tuj ĝin sendis al la gastejestrino por ke ŝi zorgu pri ĝi.
- HASTINGS Al la gastejestrino!
- MARLOW Jes, al la gastejestrino.
- HASTINGS Vi ĵus faris tion?
- MARLOW Jes; ŝi prenos sur sin la respondecon ĝin redoni, vi scias.
- HASTINGS Ho, jes, ŝi ĝin redonos, kun ĉeestanta atestanto.
- MARLOW Nu, ĉu mi ne prave agis? Mi fidas, ke vi aprobos mian zorgon en tiu ĉi okazo.
- HASTINGS (*flanken*) Ho ve! Li ne rajtas vidi mian mal-kontentiĝon.

- MARLOW Vi tamen ŝajnas iom malkvieta. Ĉu okazis ia malbono?
- HASTINGS Nenia. Mi, kontraŭe, sentas min tre bonhumora. Vi do lasis la juvelujon en la manoj de la gastejestrino, kaj ŝi, sendube, avide prenis sur sin la respondecon?
- MARLOW Jes, iom tro avide, mi ĵus pensis. Ŝi ne nur detenis la juvelujon, sed ankaŭ, por pli bona garantio, preskaŭ volis gardi la alportanton mem, ha! ha! ha!
- HASTINGS Hi! hi! hi! La juvelujo estos taŭge zorgata!
- MARLOW Ho, tiel bone kiel gineo en monujo de avarulo.
- HASTINGS *(flanken)* Ni do devos forkuri senigitaj de ĉiu ŝanco de riĉeco. *(al li)* Nu, Charles, mi devas vin lasi kun viaj meditoj pri la beleta kelnerino, kaj, hi! hi! hi! estu vi same sukcesa por vi mem, kiel vi estis por mi. *(foriras)*
- MARLOW Dankon al vi, Georgo!
(venas sinjoro Hardcastle)
- S-RO HARDCASTLE *(flanken)* Mi ne plu konas nun mian propran domon. Tie ĉi, ĉio ŝajnas renversita. Liaj servistoj jam estas tute ebriaj. Mi ne povas elteni tion pli longe. Sed, tamen, pro mia respekto al lia patro, mi estu kvie-

ta. (*al li*) Sinjoro Marlow, via servanto. (*salutas profunde*) Mi estas via humila servanto.

MARLOW Via obeema servanto, sinjoro. (*flanken*) Kio estos nun la nova mirindaĵo?

S-RO HARDCASTLE Mi opinias, sinjoro, kaj vi konsentos kun mi, ke neniu viva homo devus esti pli bonvena ĉe mi ol la filo de via patro. Mi fidas, ke vi tiel pensas,

MARLOW Tre certe, sinjoro. Por tio mi neniam bezonas multan peton. Mi ĝenerale bonvenigas la filon de mia patro, kien ajn li iras.

S-RO HARDCASTLE Tion mi plenkore kredas, sinjoro. Sed, kvankam mi nenion diras pri via persona konduto, tiu de viaj servistoj estas netolebla. Ilia trinkeja maniero donas tre malbonan ekzemplon en tiu ĉi domo, mi certigas.

MARLOW Mia tre bona sinjoro, ne kulpigu min pri tio, ĉar ne estas mia kulpo. Se ili ne tiom trinkas, kiom ili devus, nur kulpigu ilin. Mi ordonis, ke ili ne ŝparu vian kelenharon; tion mi faris, je mia vorto! (*vokante*) Ho! unu el miaj servistoj tuj venu tien ĉi. (*al li*) Mi klare ordonis — ĉar mi mem ne

trinkas — ke ili malsupre kompensu pro tio.

S-RO HARDCASTLE Ili do havis vian ordonon tiel agi, kiel ili faras! Tio sufiĉas.

MARLOW Jes, tion mi atestas. Vi tuj aŭdos unu el ili.
(venas ebria servisto)

MARLOW Vi, Jeremy! venu tien ĉi, fripono! Kion mi ordonis al vi? Ĉu vi ne devus malŝpare trinki, kaj demandi kian ajn trinkaĵon laŭvole, por la profito de la domo?

S-RO HARDCASTLE Mi tuj perdos paciencon.

SERVISTO Libereco kaj Fleet Street por eterne, via Moŝto. Kvankam mi nur estas servisto, mi tamen staras same prave kiel iu alia. Antaŭ la noktomanĝo mi ne volas trinki por iu ajn, sinjoro! Sur bona manĝo bona likvoro bone sidos, sed bona manĝo ne sidos *(singulto)*. . . sur mia konscienco, sinjoro.
(foriras)

MARLOW Vi vidas, maljunulo, ke la individuo estas kiel eble plej ebria. Mi ne scias, kio kontentigus vin, krom ke vi ensorbigus al ili plenan bierbarelon.

S-RO HARDCASTLE *(flanken)* Tondro! Li min frenezigas se mi min detenos pli longe. *(al li)* Sinjoro Marlow, mi jam toleris viajn insultojn dum pli

ol kvar horoj kaj mi ne vidas ilian finon. Mi nun decidas, ke mi tuj estos mastro ĉe mi, sinjoro, kaj mi volas ke vi, kune kun via trinkularo, tuj foriru de tie ĉi.

MARLOW Foriri el la domo? Ne; vi certe ŝercas, mia bonkorulo! Kial do, kiam mi penadas fari ĉion, kiel eble plej mi povas, por kunten-tigi vin?

S-RO HARDCASTLE Mi certigas al vi, sinjoro, ke vi tute ne kontentigas min; tial mi deziras, ke vi tuj foriru.

MARLOW Sed, vi ne serioze parolas! Foriri, en tia nokta horo, kaj en tia nokto! Ne, ne, nur moke vi tiel parolas.

S-RO HARDCASTLE Mi ripetas, ke mi tre serioze parolas. Plie, nun, kiam vi min tiel kolerigas, mi sciigas al vi, ke ĉi tiu domo estas mia, kaj ordonas, ke vi tuj de ĝi foriru.

MARLOW Ha! ha! ha! Kia starakveto en pluvego! Mi nenien eĉ paŝon iros, tion mi certigas. *(grave)* Ĉu vi diris, ke ĉi tiu domo estas via? Nu, mi atestas, ke ĝi estas mia kaj mia estos, dum mi elektos stari en ĝi! Per kia rajto vi ordonas, ke mi foriru el ĉi tiu domo, sinjoro? Mi neniam renkontis tian senhontecon en mia tuto vivo.

S-RO HARDCASTLE Konfuzego! Same mi povas diri! Homo venas en mian domon, ordonas tion, kio al vi plaĉas, eĉ forpelas min el mia propra seĝego, insultas la tutan familion, devigas sian servistaron ebriiĝi, kaj poste diras al mi: Tiu ĉi domo estas mia, sinjoro, k.t.p. La senhonteco mem! Tio ridigas min, ha! ha! (*mokeme*) Mi petas vin, sinjoro, ĉar vi prenas la domon, ke vi ankaŭ prenu la meblaron. Jen estas paro da arĝentaj kandelingoj kaj fajroŝirmilo, kaj blovilo kun kupra nazeto, kredeble ili taŭgos por via kaprico.

MARLOW Alportu vian kalkulon, sinjoro; alportu vian kalkulon, kaj ni ĉesu la disputadon.

S-RO HARDCASTLE Ankaŭ estas serio da pentraĵoj: ĉu ne ĉi tiu "Irado de sentaŭgulo" estus bona ornamo por via privata ĉambro?

MARLOW Alportu vian kalkulon, mi ree diras, kaj mi senprokraste foriros de tie ĉi.

S-RO HARDCASTLE Estas ankaŭ mahagona tablo, en kiu vi povos vidi vian vizaĝon.

MARLOW La kalkulon, mi petas.

S-RO HARDCASTLE Ha! mi forgesis la molan apogseĝon; tre konvena ĝi estus por via persona ripozo post pleniga manĝo.

MARLOW Dipovo! Tuj alportu vian kalkulon, kaj ĉesu la disputon.

S-RO HARDCASTLE Junulo, junulo, la letero de via patro igis min atendi bonedukitan, modestan vizitanton tie ĉi; sed mi trovas, ke li ne estas pli inda ol fanfara petolulo? Sed via patro tuj alvenos, kaj li certe aŭdos pri tio. *(foriras)*

MARLOW Kion li volis diri? Ne! ĉar kredeble mi ne eraris pri la domo! Ĉio tie ĉi similas al gastejo! Ĉiu servisto krias: Tuj, tuj, sinjoro, mi venos! La servado estas malorda, malgracia, kaj plie, eĉ kelnerino servas nin. Sed, jen ŝi venas; eble ŝi klariĝos al mi la aferon. *(vokas)* He! knabino, kien vi tiel rapidas? Mi petas pri vorto kun vi. *(venas fraŭlino Hardcastle)*

F-INO HARDCASTLE Ĝi do estu tre mallonga, ĉar mi bezonas rapidi. *(flanken)* Ŝajnas al mi kvazaŭ li ĵus eltrovis sian eraron: tro frue tamen estas por elrevigi lin.

MARLOW Mi petas, ke vi respondu unu demandon, knabino. Kiu estas vi! Kio estas via okupo en tiu ĉi domo?

F-INO HARDCASTLE Parencino de la familio, sinjoro.

MARLOW Kio! Ĉu malriĉa parencino?

- F-INO HARDCASTLE** Jes, sinjoro, humila parenfino, kies okupo estas porti la ŝlosilojn kaj zorgi, ke al gastoj ne manku io, kion mi povas al ili alporti.
- MARLOW** Tio signifas, ke vi estas kelnerino en tiu ĉi gastejo, ĉu ne?
- F-INO HARDCASTLE** Gastejo! ho! la! sinjoro! Kio metis tian ideon en vian kapon? Unu el la plej indaj familioj en la regiono, gastejtenantoj! Ha! ha! ha La biendomego de respektinda sinjoro Hardcastle, gastejo!
- MARLOW** La domo de sinjoro Hardcastle? Ĉu tiu ĉi domo estas tiu de sinjoro Hardcastle?
- F-INO HARDCASTLE** Jes, certege. Kies domo ĝi estus do?
- MARLOW** Nu! nu! Ĉio klariĝas! Oni malavare trompis min. Konfuzego! Kia malspritulo mi estas! Ho! Ĉiuj urbanoj nun min mokos, certe! Min oni ĉie karikaturos per pentraĵo kaj gravuraĵo, sub la titolo de "Naivega Makaronio" — ke mi iam rigardis tiun ĉi domon, inter kaj el ĉiuj, kiel gastejon! Kaj la respektindan amikon de mia patro kiel gastejstron? Ho! kia fanfarona malestiminda hundido mi nun devas ŝajni al li! Kia idioto mi fariĝis en lia ĉeesto! Ke mi

pendu, kara mia, se mi ne ankaŭ pensis, ke vi estas kelnerino!

F-INO HARDCASTLE Dio mia, dio mia! Mi certigas, ke nenio en mia konduto povas supozigi, ke mi apartenus al tia metio.

MARLOW Nenio, kara mia, nenio. Sed, kompreneble, dum mi penadis plenigi serion da eraĵoj, nepre mi agis kun vi sammaniere. Mia malsaĝeco ĉion vidis renversite. Vian ĝentilan atentecon mi alprenis kiel petolaĵon. Al mi via simplanimeco nur ŝajnis ruza logaĵo! Sed ĉio nun estas finita. En tiu ĉi domo, mi de nun ne povas plu montri mian vizaĝon.

F-INO HARDCASTLE Mi fidas, sinjoro, ke mi ne faris ion, kion vi ne aprobas. Mi tre bedaŭrus se mi, nekonscie, malkontentigus sinjoron, kiu tiel ĝentile kaj afable agis kun mi. Mi estus tre ĉagrenita . . . (*ŝajnas ekplori*) se li forlasus la familion nur pro mia kulpo. Mi ne povus elteni, ke oni diru malbonaĵon pri mi, ĉar mia sola posedaĵo estas mia bonfamo.

MARLOW (*flanken*) Ĉielo! Ŝi ploras. Tio estas la unua kortuŝa signo, kiun iam montris al mi modesta virineto! (*al ŝi*) Vian pardonon, ĉar-

ma knabino, sed vi, el la familio, estas la sola ero, kiun mi bedaŭre lasos. Tamen, mi devas klarigi al vi, ke la malsameco de nia persona rango, posedo, kaj edukiteco, malhelpas honoran interligon por ni, kaj mi nenian povos eĉ pensi pri malhonoro eĉe persono, kies sola kulpo estas troa ĉarmo!

F-INO HARDCASTLE (*flanken*) Noblanimulo! Mi nun komencas lin admiri. (*al li*) Sed mi certigas, ke mia familio estas same bona kiel tiu de Hardcastle; kaj, kvankam mi estas malriĉa, tio ne estas granda malfeliĉo por kontenta koro; kaj ĝis nun mi neniam pensis, ke manko de riĉaĵo estas malbono.

MARLOW Kial do vi nun alimaniere pensas, beleta simplanimulino?

F-INO HARDCASTLE Ĉar tio starigas min malproksime de iu, al kiu, se mi posedus mil librojn, mi kore donus al ili.

MARLOW (*flanken*) Tia simplanimeco tiel min ĉarmas, ke se mi pli longe restos, ŝi tute min venkos. Unu sentiman penon tuj mi faru. (*al ŝi*) Via favora particeco, mia kara, profunde kortuŝas min, kaj, se mi nur devus vivi por mia memkontentiĝo, tre facile mi

elektus kunulinon! Sed, komuna opinio min tro devigas, tro ankaŭ la patra volo . . . tiel ke mi apenaŭ povas diri al vi. Multe tio min kortuŝas . . . Adiaŭ!

(li foriras)

F-INO HARDCASTLE Mi neniam, ĝis nun, konis la duonon da lia merito. Li ne foriros, se mi iam havas povon aŭ ruzon por lin deteni. Mi daŭrigos ludi la nunan rolon, per kiu mi humiliĝas por venki. Sed tuj mi klarigos la aferon al paĉjo, kiu eble per ridoj igos lin ŝanĝi sian intencon foriri.

(ŝi foriras)

(venas Tony kaj fraŭlino Neville)

TONY Ha! Vi ŝtelu mem venontfoje! Mi faris mian devon. Ŝi rekaptis la juvelojn, kaj nun ŝi certe havas ilin en sia posedo. Sed ŝi kredas, ke ĉio okazis pro eraro de la servistoj.

F-INO NEVILLE Sed, mia kara kuzo, vi tute ne lasos nin en tia mizerego! Se ŝi eĉ iomete suspektus pri mia forkuro, ŝi certe malliberigus min, aŭ eble sendus min al onklino Pedigree; kaj tio estus dekoble pli mizera sorto.

TONY Certe, ĉiuspecaj onkloj estas malbonuloj, sed kion mi povas fari? Mi ĵus mendis

por vi paron da ĉevaloj, kiuj flugrapidos kiel vento, kaj mi certigas, ke vi ne povas plendi, ke mi ne taŭge amindumas vin, kie ajn patrino ĉeestas. Jen ŝi venas . . . ni tuj ŝajne interkaresu por kvietigi ŝin kaj forigi ĉiun suspekton.

*(ili flankeniras kaj ŝajnas sin interkaresi)
(venas sinjorino Hardcastle)*

S-INO HARDCASTLE Mi certe preskaŭ freneziĝis . . . sed mia filo diras, ke ĉio estis nur eraro de servistoj. Mi tamen ne trankviliĝos tute, ĝis ili nepre edziĝos. Tiam ŝi havu siajn juvelojn. Sed, kion mi vidas? Kiel mi vivas! Ili nun sin interkaresas! Mi neniam vidis Tonym agi tiel spriteme! Ha! mi ĵus vin kaptis, ĉarmaj miaj kolomboj! Kion! Vi volas interkisi? Kiaj dolĉaj interrigardoj, kaj mal-laŭtaj murmuradoj! Ha!

TONY Murmuroj! Jes, patrino, ni ofte interplendas, plimalpli, mi certigas. Sed ni ne malŝparas amindumadon.

S-INO HARDCASTLE Nur akva guto al la flamo, Tony; ĝi nur pli aktiviĝos kaj plibriliĝos.

F-INO NEVILLE Kuzo Tony ĵus promesis, ke li pli ofte ĉeestos hejme. Certe li neniam nin forlasos de nun, he! kara kuzo?

- TONY Ho! kia beleta kreito ŝi estas! Ne! mi preferus lasi mian propran ĉevalon kiel garantiaĵon ol lasi vin, kiam vi tiel ridetas apud mi. Via rido tiel vin ĉarmigas!
- F-INO NEVILLE Agrabla kuzo! Kiu ne admiros tian, naturan bonhumoron, tiun plaĉan, larĝan, ruĝan, senzorgeman, sentiman vizaĝon. *(ŝi karese tuŝas lian vangon)*
- TONY Mi certe ĉiam amis la avelajn okulojn de kuzino Konjo kaj ŝiajn beletajn longajn fingrojn, kiuj tordigas tie ĉi kaj tie sur la klavaro, kiel bobenaro!
- S-INO HARDCASTLE Ha! li ensorcus eĉ birdon sur arbo. Neni- am mi sentis en mi tian feliĉon antaŭe. La kara knabo tute similas al sia patro, la bedaŭrinda sinjoro Lumpkin. La juveloj, mia kara Konjo, tuj estos viaj. Vi ilin posedos. Ĉu li ne estas ĉarmulo, kara mia? Vi ge- edziĝos morgaŭ; kaj ni prokrastos lian ceteran edukadon . . . same ke la predi- kojn de pastro Dormigul . . . ĝis pli oport- tuna okazo. *(venas Diggory)*
- DIGGORY Kie estas la mastreto? Jen estas letero por via Moŝto, sinjoro.

- TONY Ĝin donu al patrino; ŝi ĉiam unue legas ĉiujn miajn leterojn.
- DIGGORY Oni ordonis al mi, ke senpere mi donu ĝin al vi persone.
- TONY Kiu estas la sendinto?
- DIGGORY Via Moŝto tion devas demandi al la leteromem.
- TONY Mi tamen tre dezirus scii. (*Li turnas kaj returnas la leteron kaj ĝin rigardas mire*)
- F-INO NEVILLE (*flanken*) Ho ve, ho ve! Tio estas la letero de Hastings. Mi konas lian manskribon. Se la onklino ĝin vidos, tuj okazos nia ruiniĝo. Mi peno iom distri ŝin, se estos eble. (*al sinjorino Hardcastle*) Ha! mi forĝesis diri al vi, sinjorino, la ŝercan respondon, kiun mia kuzo ĵus diris al sinjoro Marlow. Ni tre ridis je ĝi. Mi unue sciigos al vi ke . . . sed, mi petas, venu tien ĉi . . . Mi ne volus, ke li aŭdus nin. (*ili interparolas mallaŭte*)
- TONY (*daŭrigas miri pri la letero*) Malbena streĉita peco da skribaĵo ĝi estas. Neniam mi vidis tian malbonaĵon antaŭe. Presaĵojn mi tre bone legas Sed tiuj ĉi manpreniloj, kruraĵoj, streketoj malhelpas min distingi eĉ kapojn el vosto. "Al Lia Moŝto Antony

Lumpkin” tion mi povas legi, kaj ankaŭ la eksteraĵon de ĉiuj leteroj, kie mia nomo aperas. Sed tuj kiam mi sensigeligas leteron, enigmo ĝi fariĝas. Granda malfeliĉo tio estas, ĉar la interno ĉiam enhavas la kremon de korespondado.

S-INO HARDCASTLE Ha! ha! ha! Pravege, tre bone. Tial, mia filo sin montris inda kontraŭulo de la filozofa.

F-INO NEVILLE Jes, sinjorino, tute. Sed, onklino, estas bezonate, ke vi aŭdu la ceteron. Venu tien ĉi, pli flanken, por ke li ne aŭdu. Mi tuj diros al vi, kiel li poste ankoraŭ lin mirigis.

S-INO HARDCASTLE Nu, ŝajnas al mi, ke li mem nun strange miregas.

TONY *(ĉiam rigardanta sian leteron)* La skribaĵo aperas renversita, kvazaŭ ĝi estus ebria. *(legas)* ”Kara Sinjoro”. Jes, tiel ĝi diras, tiam jen estas M, kaj T, kaj S, sed ĉu tiu ĉi estas Z aŭ R, mi pendu, se mi scias.

S-INO HARDCASTLE Kio do estas, karulo? Ĉu mi helpu vin?

F-INO NEVILLE Mi petas vin, onklino, permesu, ke mi ĝin legu. Neniu povas legi malgrandan skribaĵon pli bone ol mi. *(kaptas la leteron de li)* Ĉu vi scias, de kiu ĝi venas?

- TONY Mi ne povas diveni, ĉu ne de Dick Zingibrul, la brutpaŝtisto.
- F-INO NEVILLE Akurate vi divenis. (*ŝajnas legi*) ”Kara bienestreto, — Esperante, ke vi bone sanas, kiel mi nun faras. La anoj de ’Saksvinga Klubo’ batis tiujn de ’Ansera Herbejo’, absolute. La vetado estis tre . . . hm . . . batalo perdita . . . hm . . . longe batigis . . . hum!” Jen ĝin prenu, estas nur kokobataloj . . . k.t.p. ĝi taŭgas por nenio . . . Ĝin prenu kaj enpoŝigu. (*donas al li la leteron tute ĉifitan*)
- TONY Sed mi certigas al vi, fraŭlino, ke ĝi estas tre grava afero. Mi ne volus senigi je la cetero por io en la mondo. Ne grava afero, vi diras. Jen, patrino, tuj ĝin legu, kaj diru min pri ĉio. (*donas al ŝi la leteron*)
- S-INO HARDCASTLE Kion mi vidas? (*legas*) ”Kara sinjoro, — Mi nun atendas fraŭlinon Neville kun veturileteto kaj ĉevalparo ĉe la ekstremaĵo de la ĝardeno, sed miaj ĉevaloj ne estos kapablaj fari tian vojiron. Mi fidas, ke vi helpos nin per alia paro, laŭ via promeso. Rapideco estas necesa, ĉar alimaniere la furio — jes furio — (via maljuna patrino) nin suspektos. Via, Hastings.” Ho mia Dio,

paciencu! Mi tuj freneziĝos! Kolero min sufokas!

F-INO NEVILLE

Mi fidas, sinjorino, ke vi ĉesigos vian kole-
ron dum kelkaj minutoj, kaj ne implicos al
mi ian malrespektaĵon aŭ malboninten-
con, kiu de alia venas.

S-INO HARDCASTLE

(sin klinas profunde) Bele vi parolas, fraŭ-
lino, kaj mirinde ĝentila kaj afabla vi estas,
cetere modelo de delikateco kaj singarde-
mo! *(ŝanĝas sian voĉtonon)* Nun, vi malbe-
la sentaŭgulo, kiu apenaŭ posedas sufiĉan
sencon por silentiĝi! Ĉu ankaŭ vi kunkon-
spiris kontraŭ mi? Sed mi tuj malhelpos
viajn intrigojn. Pri vi, fraŭlino, ĉar vi jam
havas paron da ĉevaloj tute pretaj, estus
kruelaĵo ilin ne uzi. Tial, mi petas, ansta-
taŭ forkuri kun via kunkulpulo, pretiĝu,
tiun ĉi nunan momenton, por forkuri kun
mi. Via maljuna onklino Pedigree taŭge
vin gardos, mi certigas. Vi, sinjoro, bonvo-
lu rajdi sur vian ĉevalo por protekti nin
dum la veturado. Venu Thomas, Roger,
Diggory! Mi pruvos al vi, ke mi zorgas pri
vi pli bone ol vi mem. *(foriras)*

F-INO NEVILLE

Mi do estas nun ruinigita.

TONY

Jes, tio estas certa.

- F-INO NEVILLE Kion pli bonan mi povis atendi de mia parenceco kun tia malsaĝulo . . . malgraŭ multaj kapsignoj kaj palpebrumoj kiujn mi faris?
- TONY Je leĝoj! fraŭlino, nur via lerteco, kaj ne mia malspriteco, malhelpis vian aferon. Vi tiel sprite kaj kompetente parolis pri "Saksvinguloj" kaj "Ansera Herbejo", ke mi tute pensis, ke vi ne ŝajnis, sed vere legis.
- (venas Hastings)*
- HASTINGS Nu, sinjoro, mia servisto ĵus diris al mi, ke vi montris mian leteron! Ĉu tio ne estas perfidaĵo, junulo?
- TONY Jen estas alia mallaŭdanto. Demandu al tiu ĉi fraŭlino, kiu perfidis? Ŝi, je Dio, ĉion faris, ne mi!
- (venas Marlow)*
- MARLOW Vi do ĉiuj kunkonspiris por min trompi tie ĉi. Vi incitis min tute malestimindiĝi, maldelikatiĝi; dank' al vi, oni min insultis, mokis, ridis je mi!
- TONY Jen estas unu plia. Ni tuj havos frenezulan kunvenon.
- F-INO NEVILLE Kaj jen estas la sinjoro, kiun ni devas danki pro ĉio tio. *(montras al Tony)*

- MARLOW Kion mi povas diri al li, simpla knabo, idiotaĵo kies nescio kaj nematuraĝo ŝirmas je riproĉoj.
- HASTINGS Malestimebla naivegulo, eĉ malinda je puno.
- F-INO NEVILLE Kaj tamen sufiĉe ruza kaj malica por sin amuzi je niaj malkontentiĝoj.
- HASTINGS Sensentema hundido!
- MARLOW Nur amaso da petola bubado.
- TONY Bah! mi tuj batalos kun vi, unu post la alia — per korboj.
- MARLOW Pri li, li ne estas notebla. Sed via propra konduto, sinjoro Hastings, postulas klarigon. Vi sciis pri miaj eraroj, kaj tamen ne forigis ilin.
- HASTINGS Ĉagrenita kiel mi estas pro mia persona malsukceso, vere la nuna tempo estas maltaŭga por klarigoj. Via demando ne estas amika, sinjoro Marlow — —
- MARLOW Tamen, sinjoro — —
- F-INO NEVILLE Sinjoro Marlow, ni neniam kuraĝigis vian eraron, sed ni trovis, ke estis tro malfrue por ĝin forigi. Kvietiĝu, mi petas.
- (*venas servisto*)
- SERVISTO Mia mastrino deziras vin pretigi tuj, fraŭlino. La ĉevalojn oni jungas nun. Viaj ĉa-

pelo kaj vestaĵo estas en la apuda ĉambro. Ni devas veturi tridek mejlojn antaŭ la tagiĝo.

(foriras la servisto)

F-INO NEVILLE

Bone, nu, mi tuj venos.

MARLOW

(al Hastings) Ĉu estis amikaĵo, sinjoro, helpi ridindigi min? Montri min kiel malindulon al ĉiuj konatoj? Sciu, ke mi demandos de vi klarigon.

HASTINGS

Ĉu estis amikaĵo, sinjoro, se tiel vi deziras argumenti, sendi al alia persono tion, kion mi komisiis al via zorgo?

F-INO NEVILLE

Sinjoro Hastings, sinjoro Marlow, ne pli grandigu mian ĉagrenon per tiu ĉi sentaŭga disputo. Mi petas, mi petegas . . .

(venas servisto)

SERVISTO

Jen via mantelo, fraŭlino; la mastrino fariĝas senpacienca.

(foriras)

F-INO NEVILLE

Mi tuj venos. Paciĝu, mi petas. Se mi vin lasos en tia stato, mi mortos pro timo.

(venas la servisto)

SERVISTO

Jen ventumilo, mufo kaj viaj gantoj, fraŭlino. La ĉevaloj atendas.

(foriras)

- F-INO NEVILLE Ho, sinjoro Marlow! Se vi scius, al kia mallibera stato kaj ofendiĝo mi tuj foriros, certe via kolero ĉesus kaj fariĝus komparto!
- MARLOW Tiel konsternita mi sentas min pro diversaj kaŭzoj, ke mi apenaŭ scias, kion mi faras. Pardonu min, fraŭlino, George, pardonu min. Vi konas mian fajreran humoron, vi ne devus ĝin eksciti.
- HASTINGS Mia turmentega stato estu mia sola senkulpiĝo.
- F-INO NEVILLE Nu! mia kara Hastings, se vi sentas por mi la estimon, kiun mi fidas, kiun mi scias, ke vi havas, via konstanteco dum tri jaroj nur igos la sekvontan feliĉon nian pli granda — Se . . .
- S-INO HARDCASTLE (*de interne*) Fraŭlino Neville! Constance, venu tuj, Constance!
- F-INO NEVILLE Mi tuj venos . . . Nu! Konstanteco, memoru; konstanteco estu via vortordono! (*foriras*)
- HASTINGS Ho! mia kor'! Kiel elporti ĉi tion? Kaj tiel proksime al feliĉo!
- MARLOW (*al Tony*) Nun vi vidas, juna sinjoro, la sekvon de via petolaĵo. Kio por vi estis nur

amuzaĵo, tio fariĝas malkontentiĝo kaj malfeliĉo por ni.

TONY

(el revado) Je Dio, mi tuj elturniĝos, mi ĵus pensis. Viajn manojn! Ambaŭ vian kaj vian, miaj sulkuloj! Miajn botojn tien ĉi, ho! Estu, post du horoj de nun, ĉe la ĝardeno ekstremaĵo, kaj vi vidos — Se vi ne tiam trovos, ke Tony Lumpkin estas pli bonkora ol vi pensas, mi tuj permesos al vi preni mian plej bonan ĉevalon, kaj eĉ Bettyn Bouncer vi povos alkalkuli. Venu! Miajn botojn tuj! ho?

(ili foriras)

KVINA AKTO

SCENO 1

En salono de kampara domo.

(Venas Hastings kaj servisto)

HASTINGS Vi do vidis la maljunan sinjorinon kaj fraŭlinon Neville kune veturi, kiel vi ĵus diris?

SERVISTO Jes, Via Moŝto, ili foriris per veturileto kune kun la juna bienestro, kiu flanke rajdas por ilin gardi. Ili nun devas esti ĉirkaŭ tridek mejloj for de tie ĉi.

HASTINGS Sekve, ĉiuj miaj projektoj nuliĝas.

SERVISTO Jes, sinjoro. Maljuna Sir Charles ĵus alvenis. Li kaj la maljuna domestro, dum duonhoru ridadis pri la strangaj eraroj de sinjoro Marlow . . . Sed, jen ili venas tien ĉi.

HASTINGS Kaj laŭe, tie ĉi mi ne devas min montri. Nu, mi do iru al la ĝardenekstremaĵo; sentaŭga kunvenejo! Estas preskaŭ la horo.

(ili foriras)

(venas Sir Charles kaj sinjoro Hardcastle)

S-RO HARDCASTLE Ha! ha! ha! la mastra voĉtono, per kiu li sciigas al ĉiu el ni siajn altegajn ordonojn!

SIR CHARLES Kaj kompreneble la zorga singardemo, per kiu li ricevis ĉiujn viajn bonoferojn!

S-RO HARDCASTLE Sed mi tamen pensas, ke li devus vidi ion en mi, kio superas ordinaran gastejestron, ĉu ne?

SIR CHARLES Jes, jes, Dick, li tute konsideris vin kiel eksterordinaran gastejestron; ha! ha! ha!

S-RO HARDCASTLE Nu, mi nun sentas min tiel bonhumora, ke mi povas nur ĝoji. Jes, kara amiko, per tiu ĉi interligo de niaj familioj, nia amikeco fariĝos hereda, kaj, kvankam la doto de mia filino estas nur malgranda — — —

SIR CHARLES Kial do, Dick, vi tiel parolas pri doto al mi? Mia filo jam posedas pli ol moderan havon, kaj certe ne bezonas ion krom bonan virtan knabinon por partopreni en lia feliĉo, kaj tiel ĝin pligrandigi. Se ili amas unu la alian, kiel vi diris — —

S-RO HARDCASTLE Se? Karulo! Mi atestas, ke ili tre amas unu la alian. Mia filino tion preskaŭ diris al mi.

SIR CHARLES Sed knabinoj foje eraras per troa memfido.

S-RO HARDCASTLE Mi mem lin vidis premi ŝian manon en varmega maniero. Sed, jen li venas por forigi ĉiujn viajn dubojn, mi certigas.

(venas Marlow)

MARLOW Mi revenas, sinjoro, por peti vian pardonon pro mia stranga konduto. Apenaŭ mi povas senhonte pensi pri mia insultemo.

S-RO HARDCASTLE Bah! nur bagatelo! Vi tro grave rigardas tion. Kiam dum du-tri horoj vi estos ridinta kun mia filino, vi tute forgesos tian ne-gravaĵon. Ŝi neniam pensos pli malbone pri vi pro la okazo.

MARLOW Sinjoro, mi ĉiam tre ŝatos ŝian aprobon.

S-RO HARDCASTLE Malvarma vorto estas "aprobo", sinjoro Marlow. Se mi ne eraras, estas io pli grava ol "aprobo", kion vi volis diri. Vi min komprenas, ĉu ne?

MARLOW Vere, sinjoro, mi tute ne havas la plezuron vin kompreni.

S-RO HARDCASTLE Nu, junulo, kvankam mi mem estas maljuna, mia observado malofte erarigas min. Mi scias tion, kio okazis inter vi — tamen — mi silentos, se . . .

MARLOW Certe, sinjoro, okazis nenio inter ni, krom miaflanke profunda respekto, kaj ŝiavice plej granda detenemo. Kompreneble, vi

ne povas pensi, ke mi insulteme agis kun ĉiuj viaj familianoj, sinjoro.

S-RO HARDCASTLE Ne, ne insulteme. Mi ne tion diras. Vi tute ne agis insulteme. Sed, kvankam knabinoj ŝatas, ke oni foje ludas kun ili, ŝi neniam rakontis pri tiaj okazoj, mi certigas.

MARLOW Mi neniam donis al ŝi la plej malgrandan kaŭzon por tion fari.

S-RO HARDCASTLE Nu, nu, mi amas modestecon en propra tempo kaj loko, sed i tio estas troigo. Karulo, ne timu, ĉar via patro kaj mi pli amos vin, se vi malkaŝe parolos.

MARLOW Mi mortu, sinjoro, se iam . . .

S-RO HARDCASTLE Mi certigas al vi, ke ŝi tute ne malamas vin, kaj mi bone scias, ke vi ŝin amas . . .

MARLOW Kara sinjoro, mi atestas, ke . . .

S-RO HARDCASTLE Mi ne konas ian malhelpon al via feliĉo, tial, kiel eble plej frue, la pastro povos vin geedzigi.

MARLOW Sed, aŭskultu min, sinjoro . . .

S-RO HARDCASTLE Via patro aprobas, kaj mi ĝoje vidos la aranĝon. Estus domaĝo havi eĉ momenton da prokrasto.

MARLOW Sed, kial vi ne volas min aŭskulti? Per ĉio estas justa kaj vera, mi neniam donis al fraŭlino Hardcastle eĉ la plej simplan

amosignon, eĉ la plej malgrandan markon de sentimentalajo. Nur unu intervidiĝon ni iam havis, kaj ĝi fariĝis tre deca, modesta kaj neinteresa.

S-RO HARDCASTLE (*flanken*) Nu, tiu individuo kaj lia deca, modesta senhonteco fariĝas nesufereblaj.

SIR CHARLES Kaj vi neniam premis ŝian manon, neniam faris al ŝi amproponojn?

MARLOW Mi atestas antaŭ la ĉielo, ke mi nur venis tien ĉi por obei vian ordonon. Mi vidis la fraŭlinon sen kortuŝeco, kaj ŝin lasis sen bedaŭro. Mi nun fidas, ke vi ne min devigos doni pli grandan pruvon pri mia obeo, ke vi ne malpermesos min foriri el domo, en kiun mi alportis tiom da humiligo.

(*foriras*)

SIR CHARLES Mi tute miras pri la inda maniero de lia foriro.

S-RO HARDCASTLE Kaj mi miras pri lia malkaŝa, maltimiga senhonteco.

SIR CHARLES Honoron kaj vivon kiel garantiaĵon mi donus pri lia vereco.

S-RO HARDCASTLE Jen venas mia filino; kiel garantiaĵon de ŝia veramo mi donus ian esperon de feliĉeco.

(*venas fraŭlino Hardcastle*)

- S-RO HARDCASTLE Venu tien ĉi, Kotinjo. Respondu al ni sincere, filino, kaj tute nekaŝeme. Ĉu sinjoro Mario iam montria al vi signojn de amo?
- F-INO HARDCASTLE Tre subita estas la demando, sinjoro. Sed ĉar vi deziras malkaŝan sincerecon, jes, mi pensas, ke li tiel agis.
- S-RO HARDCASTLE *(al Sir Charles)* Vi vidas.
- SIR CHARLES Mi petas, fraŭlino, diru al mi ĉu vi kun mia filo iam havis pli ol unu intervidiĝon.
- F-INO HARDCASTLE Jes, Sir Charles, multajn.
- S-RO HARDCASTLE *(al Sir Charles)* Vi vidas.
- SIR CHARLES Sed, ĉu li esprimis ian inklinton?
- F-INO HARDCASTLE Jes, kaj daŭran amon.
- SIR CHARLES Ĉu li do parolis pri amo?
- F-INO HARDCASTLE Multe kaj ofte, sinjoro.
- SIR CHARLES Mirinde! kaj tre serioze?
- F-INO HARDCASTLE Certe, tre serioze.
- S-RO HARDCASTLE Nun, amiko, mi fidas, ke vi estas kontenta.
- SIR CHARLES Kaj, kiel li kondukis, fraŭlino?
- F-INO HARDCASTLE Ho, same kiel plej multaj admirantoj faras. Li esprimis iom da ĝentila laŭdo pri mia vizaĝo, — parolis multe pri sia persona manko de merito, — ankaŭ diris pri sia koro, — donis al mi mallongan tragedian pecon, — kaj ĉion finiĝis per ŝajna ravaĵo.

SIR CHARLES Nun, mi tute konvinkiĝas. Mi bone konas lian modestan kaj submetiĝeman konduton kun sinjorinoj. Ne! tia aroganta, antaŭena, laŭta maniero tute ne apartenas al li. Mi certigas, ke li neniam estis la originalo de via priskribo.

F-INO HARDCASTLE Nu, sinjoro, se mi konvinkos viajn okulojn pri mia sincereco? Se vi kaj paĉjo, post ĉirkaŭ duonhoro de nun, bonvolu vin loki malantaŭ tiu ŝirmilo, vi aŭdos lin persone anonci sian amon por mi.

SIR CHARLES Mi konsentas. Kaj se mi lin trovos tia, kia vi lin priskribis, ĉiu mia kontentiĝo pri li devos foriĝi.

(foriras)

F-INO HARDCASTLE Kaj se vi ne lin trovas tian, kian mi lin priskribis, — mi timas, ke mia feliĉo neniam komencos.

(ili foriras)

(La scenejo aliformiĝas kiel ĝardenekstremo)

HASTINGS Ho kia idioto mi fariĝas! Tie ĉi atendanta personon, kiun kredeble mia humiliĝo ĝojigas! Li neniam precize intencis veni. Tial mi pli longe ne atendas . . . Sed, kion

mi vidas? Estas li mem, kaj eble li alportas sciigojn pri mia Constance.

(venas Tony kun altaj kotaj botoj)

HASTINGS Honesta bienestro! Nun mi vin trovas kredinda sinjoro! Tio tute montras amikecon!

TONY Jes, amiko via mi estas, kaj la plej bona amiko en la mondo, se vi ĉion konus . . . Tia nokta rajdado vere estas malbene laciĝa! Ĝi min skuadis pli terure ol korbeĝon de publika veturilo.

HASTINGS Sed kiel? Kie vi lasis viajn kunvoĵirantinojn? Ĉu ili estas sendanĝere lokitaj? Ĉu ili estas en iu domo?

TONY Dudekkvin mejlojn en la daŭro de du kaj duona horoj. Tio ne estas malbona veturo! La malfeliĉaj brutoj suferis kaj ŝvitadis pro tio! Mi kunikliĝu, se mi ne preferus rajdi kvardek mejlojn post vulpo ol nur dek mejlojn kune kun tiaj kreitoj!

HASTINGS Nu, do, kie vi lasis la sinjorinojn? Malpacienco min mortigas.

TONY Kie mi lasis ilin? Nu, kie mi povus ilin lasi, ol tie, kie mi unue trovis ilin?

HASTINGS Enigmo tio ŝajnas.

- TONY Enigmo? Nu do divenu tion: kio estas tio, kio turniĝas ĉirkaŭ la domo kaj tamen neniam ĝin atingas?
- HASTINGS Mi ne povas diveni.
- TONY Kaj ili ankaŭ ne povis diveni, kien mi kondukis ilin. Per gingo! ne estas laĝeto aŭ marĉeto, ĉirkaŭ kvin mejloj de tie ĉi, la kies guston enhavo ili ne konas nun.
- HASTINGS Ha, ha, ha! Mi komprenas. Vi ĉirkaŭen kondukis ilin, kiam ili pensis, ke vi iris antaŭen; kaj fine vi ilin rehejmigis.
- TONY Mi tuj diros al vi. Mi unue veturigis ilin malsupren tra Plumlit'-Vojeto, en kiu ni enŝlimiĝis bele. Ni tiam skue veturis sur la ŝtonoj de Supren-Malsupren-monteto — Tiam mi suririgis ilin ĝis la proksima Pendigil'-Erikejo, de kiu loko, ĉirkaŭirante tien ĉi kaj tien, mi bone loĝigis ilin en la apudan ĉevaltrinkejon!
- HASTINGS Sed mi fidas, ke ne okazis malbonaĵo.
- TONY Neniu, sed patrino estas terure timigita. Ŝi pensas, ke ŝi nun forestas kvardek mejlojn de la domo. Ŝi estas tute naŭzita de la veturado, kaj la ĉevaloj nun apenaŭ povus moviĝi. Tial, se via ĉevalparo estas preta, vi povas rapide forkuri kun kuzino Konjo,

ĉar mi bone scias, ke neniuj tie ĉi eĉ unu paŝon farus por vin sekvi.

HASTINGS

Karulo, kiel sufiĉe mi povos vin danki!

TONY

Jes, jes, mi nun estas via kara amiko kaj nobla parenco. Nur kelkajn horojn pli frue mi estis por vi idioto, hundido, kiun vi ĝentils, volis trabori per glavo. Malbone al via duelmanio! En tiu ĉi regiono post batiĝo ni interkisiĝas kaj tute fratiĝas. Sed se vi min estus traforinta, mortinto mi estus kaj eble vi mem interkiskus kun pendigisto.

HASTINGS

Rajte vi ĵus riproĉis min. Sed mi devas rapidi por liberigi fraŭlinon Neville. Bonvolu okupiĝi pri la maljunulino, dum mi zorgos pri la junulino.

(foriras Hastings)

TONY

Ne dubu pri mi. Jen ŝi venas. Vi do tuj malaperu! Ŝi ĵus eliĝis el la laĝeto, kaj estas trempita ĝis la zono, kiel sireno.

(venas sinjorino Hardcastle)

S-INO HARDCASTLE

Ho, Tony, mi estas mortigita, skuegigita, ĉirkaŭbatita ĝis malvivo! Mi neniam povos postvivi tion! Tiu lasta skuo, kiu ĵetis nin kontraŭ la kreskaĵbarilo tute min finis.

- TONY** Ho ve! patrino, tute via estas la kulpo. Vi volis forveturi nokte, nekonante eĉ unu colon de la vojo.
- S-INO HARDCASTLE** Mi kore dezirus rehejmigi. Neniam okazis al mi tiom da malfeliĉoj dum tiel mallonga vojiro! Enŝlimiĝinta, renversita en foŝaĵon, lokita en kotaĵon, skupremita kiel gelateno! Kaj fine ni tute perdis la vojon! Kie ni estas nun, Tony? Ĉu vi scias?
- TONY** Se mi prave juĝas, ni devas esti sur Kaprompig-altaĵo, tio estas ĉirkaŭ kvardek mejlojn for de hejme.
- S-INO HARDCASTLE** Ho ĉielo! la plej malbonfama loko en la tuta lando. Ni nur bezonas rabiĝon por plenigi tiun ĉi mizeran nokton!
- TONY** Ne timu, patrino, ne timu! El la kvinopo kiuj vagadis tie ĉi, paron oni jam pendigis, kaj eble la tri ceteraj ne renkontos nin. Ne timu! Ĉu tio estas viro, kiu galopas post ni? Ne, nur arbo ĝi estas. Ne timu!
- S-INO HARDCASTLE** Certe, timego mortigos min.
- TONY** Ĉu vi vidas ion simila al nigra ĉapelo, kio moviĝas malantaŭe en la arbusto?
- S-INO HARDCASTLE** Ho, mortiĝo!
- TONY** Ne, nur bovino ĝi estas. Ne timu, patrino, ne timu!

S-INO HARDCASTLE Tiel vere kiel mi vivulino staras, Tony, nun mi vidas viron, kiu venas al ni! Ho, mi certigas, ke li tien ĉi venas. Se li vidos nin, ni tuj pereos.

TONY *(flanken)* Je ĉio malbonŝanca! Mia duonpatro! Li venas kiel kutime por nokta promenado. *(al ŝi)* Ha! rabisto tio estas, portanta pistolojn longajn kiel mia brako. Malbonulo li ŝajnas!

S-INO HARDCASTLE Dio bona, defendu nin! Li alproksimiĝas.

TONY Vin kaŝu vin en tiun ĉi arbuston, kaj lasu al mi la renkonton. Se okazos ia danĝero, mi tusos kaj ekkrios, hem! Tuj kiam mi tusos, vi estu tute apude.

(sinjorino Hardcastle sin kaŝas post arbon en la postscenejo)

(venas sinjoro Hardcastle)

S-RO HARDCASTLE Ĉu mi eraris, aŭ ĉi mi aŭdis homajn voĉojn kiuj petis pri helpo? Ha! Tony, ĉu estas vi? Mi ne tiel frue atendis vin hejme. Ĉu via patrino kaj zorgatino estas jam en sendanĝera loko?

TONY Jes, sinjoro, ĉe onklino Pedigree — Hem!

S-INO HARDCASTLE *(malantaŭen)* Ho! mortiĝo! jen venas danĝero!

- S-RO HARDCASTLE Kvardek mejlojn, en trihora daŭro; certe tio estas troa, junulo!
- TONY Fortikaj ĉevaloj kaj bonvolaj spiritoj, oni diras, vojon mallongigas. Hem!
- S-INO HARDCASTLE Mi fidas, ke li ne malbone agos kun la kara knabo!
- S-RO HARDCASTLE Mi ĵus aŭdis voĉon de ĉi tie; mi volis scii de kie ĝi venis.
- TONY Estis mi alparolanta min mem, sinjoro, mi ĵus rimarkis, ke kvardek miloj en trihora daŭro estas bonega, kurado. Hem! kaj tre certe tio estas vera; hem! Mi preskaŭ malvarmumas en la nokta aero. Ni eniru la domon, mi petas; hem!
- S-RO HARDCASTLE Sed se vi ĵus parolis, vi ne respondis al vi mem; tion mi certigas. Du voĉojn mi aŭdis, kaj tute intencas (*pli laŭte*) eltrovi la alian!
- S-INO HARDCASTLE (*malantaŭen*) Ho, li tuj venos al mi tien ĉi, ho!
- TONY Kio devigas vin iri, sinjoro, kiam mi certigas . . . hem! — mian vivon kiel garantiaĵon! . . . estas la vero . . . hem! Mi ĉion tuj diros al vi, sinjoro. (*penas por lin deteni*)

S-RO HARDCASTLE Mi ripetas, ke vi ne min detenos, kaj insistas por vidi. Vane vi pensas, ke mi kredos al vi.

S-INO HARDCASTLE (*alkuras el la postscenejo*) Ho dio! li tuj mortigos mian melfeliĉan knabon, mian karegulon! Tien ĉi, bona sinjoro, satigu vian furiozon sur mi. Prenu mian monon, mian vivon; sed kompatu al tiu junulo, kompatu al mia knabo, se vi havas ian kompaton.

S-RO HARDCASTLE Mia edzino! Tiel vere kiel mi estas kristano. De kie ŝi venis, kaj kion ŝi volas diri?

S-INO HARDCASTLE (*genufleksas*) Havu kompaton al ni, bona sinjoro Vojrabisto . . . Prenu nian monon, niajn poŝhorloĝojn, ĉion, kion ni posedas, sed ŝparu niajn vivojn. Ni neniam persekutos vin, neniam, bona sinjoro Vojrabisto!

S-RO HARDCASTLE Mi vere kredas, ke ŝi tute freneziĝas — Kion? Dorothy! Ĉu vi ne konas min?

S-INO HARDCASTLE Sinjoro Hardcastle, mi certas! Miaj timegoj ĵus blindigis min! Sed, kara edzo, kiu povus atendi vin tie ĉi, ĉe tia terura loko, tiel fore de nia hejmo? Kio igis vin sekvi nin?

- S-RO HARDCASTLE** Certe, Dorothy, vi parolas kiel malspritu-lino. For de hejmo! Ĉirkaŭ okdek paŝoj es-tas ĝis via dompordo! *(al Tony)* Tio ĉi es-tas unu el viaj kutimaj ŝercoj, ho! vi, peto-lulo! *(al ŝi)* Ĉu vi ne rekonas la kradon, la morusarbon? Kaj ĉu vi ne rekonas la ĉe-valtrinkejon, kara mia?
- S-INO HARDCASTLE** Jes, vere, mi memoros la trinkejon tiel longe kiel mi vivos. Mi ĵus mortiĝis en ĝi. *(al Tony)* Al vi do mi ŝuldas ĉiujn tiujn mi-zerojn, malgracia maltaŭgulo! Mi instru-os al vi tiel trouzi la indulgon de via patri-no.
- TONY** Je Dio, patrino, ĉiuj paroĥanoj diras, ke vi min malbonigis, de mia knabeco; nun vi rikoltas la fruktojn de via agado kun mi.
- S-INO HARDCASTLE** Mi tuj remalbonigos vin, mi certigas. *(sekvas lin forirantan)*
- S-RO HARDCASTLE** Moralaĵon tamen enhavis lia respondo. *(foriras)*
(venas Hastings kaj fraŭlino Neville)
- HASTINGS** Kara mia Constance, kial vi tiel ŝanceli-ĝas? Se ni nur unu momenton prokrastos nian forkuron, ĉion poreterne ni perdos. Nur kuraĝu preni la decidon, kaj ni tuj forestos el la limoj de ŝia malico.

- F-INO NEVILLE Mi ne kredas, ke estus eble. La malkvieteco, kiun mi ĵus elportis, tiel senkuraĝigis min, ke mi ne povus kontraŭstari al ia nova danĝero. Pacienco, dum du-tri jaroj, fine kronos nin per feliĉo.
- HASTINGS Tia prokrasto estus pli maltaŭga ol ŝangemo. Ni tuj forkuru, ĉarmulino mia! Ni datumu nian feliĉon de tiu ĉi nun momento. Pereu riĉeco! Amo kaj kontenteco pligrandigos nian posedon pli ol eĉ monarka rento! Mi vin konvinku!
- F-INO NEVILLE Ne, sinjoro Hastings, ne. Singardemo ree venas helpi min, kaj mi obeos ĝian konsilon. Dum pasia tempo riĉecon oni povas malŝati, sed la rezulto ĉiam estas pento. Mi ĵus decidis tute min turni al sinjoro Hardcastle por kompato, justeco, kaj riparo.
- HASTINGS Sed, eĉ se li bonvolus tion montri, li ne havas la povon helpi vin.
- F-INO NEVILLE Sed li posedas influon, al kiu mi nun decidus konfidi.
- HASTINGS Mi do tute ne esperas. Sed, ĉar vi persistas, mi nepre, malgraŭ miaj duboj, devas vin obei.
- (ili foriras)*

*(la scenejo aliformiĝas)**(venas sir Charles kaj fraŭlino Hardcastle)*

SIR CHARLES

En kia situacio mi nun estas! Se tio, kion vi ĵus diris, pruviĝos, mi sekve trovos kulpan filon. Se, kontraŭe, li diris la veron, mi nepre perdos kiel bofilinon unu kiun, el ĉiuj aliaj, mi preferus.

F-INO NEVILLE

Mi sentas min fiera de via aprobo, kaj por pruvi, ke ĝin mi meritas, se vi ambaŭ vin kaŝos laŭ mia instrukcio, vi aŭdos lian klaran amkonfeson. Sed, jen li venas.

SIR CHARLES

Al via patro mi tuj iras, por ke li ĉeestu kun mi.

*(foriras sir Charles)**(venas Marlow)*

MARLOW

Kvankam mi jam estas preta por foriri, mi revenas unu fojon por adiaŭi; mi eĉ ne konis ĝis la nuna minuto, kiel dolora estas por mi la disiĝo.

F-INO HARDCASTLE

(en ŝia natura maniero) Mi kredas, ke doloroj, kiujn vi povas tiel facile forigi, ne devas esti tre grandaj, sinjoro. Se vi pli longe restus unu-du pliajn tagojn, eble malpliigus vian maltrankvilon, kaj pruvus al vi, kia bagatelo vere estas tio, kion vi konsideras kiel bedaŭrinda.

MARLOW

(flanken) Tiu ĉi knabino min ĉarmas pli kaj pli. *(al ŝi)* Tio estas neebla, fraŭlino. Mi jam tre longe ŝerce agis kun mia koro. Mia fiereco eĉ obeas mian ampasion. La malsameco de edukiteco, situacio, patra koleto, malestimo de egaluloj, ĉiuj perdos sian gravecon, tiel ke nenio povas min redoni al mi mem, krom tiu dolora forira rimedo.

F-INO HARDCASTLE

Foriru, do, sinjoro. Mi nenion plu diros por vin deteni. Kvankam mia familio staras same alte kiel tiu de ŝi, kiu venigis vin tien ĉi, kaj mia edukiteco, mi fidas, ne estas malsupera al ŝia, kio estas tiuj privilegioj, se oni komparos ilin je riĉeco? Cirkonstancoj devigas min kontentiĝi per nekontentiga aprobo de miaj meritoj; nur amŝajnon mi devas akcepti, dum vi serioze pensas nur pri riĉeco!

(venas al la postscenejo sinjoro Hardcastle kaj Sir Charles)

SIR CHARLES

Tien ĉi, malantaŭ la ŝirmilon.

S-RO HARDCASTLE

Jes, jes, ni silentu. Mi garantias, ke Kotinjo tuj hontigos lin, fine.

MARLOW

Je la ĉielo, fraŭlino, riĉeco neniam min allogis. Unue via beleco altiris mian rigardon, ĉar neniu ĝin povus vidi sen kortuŝo.

Sed dum ĉiu minuto, kiam mi parolas kun vi, vi montras al mi novan gracion, kiu pli grandigas la imagon kaj donas al ĝi pli altan signifon. Tio, kio ŝajnis al mi nur kampara naiveco, nun sin montras kiel delikata senartifikeco. Tio, kio ŝajnis petola senhontemo, nun vokas al mi kiel kombina rezulto de senkulpa kuraĝo kaj konscia virto.

SIR CHARLES *(flanken)* Kio signifas tio? Li min mirigas!

S-RO HARDCASTLE Mi ĵus diris al vi, kio nun okazas. Silentu!

MARLOW Mi nun decidas resti, fraŭlino; mi tro bone opinias pri la ĝusta juĝo de mia patro, tuj kiam li vin vidos, por dubi lian aprobon.

F-INO HARDCASTLE Ne, sinjoro Marlow, mi nek volas nek povas vin deteni. Ĉu vi pensas, ke mi povus elteni unuiĝon, kiu kredeble kaŭzus penton! Ĉu vi pensas, ke mi volus kapti nedauran pasion por poste vin kovri per konfuzo? Ĉu vi pensas, ke mi iam povus ĝui feliĉon, kiun mi akirus per malpliigo de la via?

MARLOW Je ĉia bono! Neniu feliĉo ebligos por mi krom tiu, kiun nur vi povas donaci al mi. Neniam mi pentos krom pri tio, ke mi ne pli frue komprenis viajn meritojn. Mi do

restos tie ĉi, eĉ malgraŭ viaj deziroj. Ceterre, kvankam vi persiste evitus min, mi intencas, per respektema zorga servo, igi vin forgesi ĉion pri mia antaŭa malserioza konduto.

F-INO HARDCASTLE Mi petas, sinjoro, lasu tiun intencon. Kiel nia interkonatiĝo indiferente komenciĝis, ĝi simile finiĝu. Eble ni kune malserioze uzis unu-du horojn, sed, ĉu vi reale pensas, sinjoro Marlow, ke mi iam intencus celon de unuiĝo, kiu igus min dungiĝi kaj vin malsaĝiĝi! Ĉu vi pensas, ke mi eĉ favore aŭskultus alparolon de tro memfida admiranto?

MARLOW (*genufleksas*) Ĉu tio ŝajnas memfido? Ĉu tio ŝajnas sentimeco? Ne, fraŭlino, vian indecon pligrandigas ĉiu minuto, kaj ankaŭ mian timon kaj konfuzon. Mi do restos . . .

SIR CHARLES Pli longe mi ne povas halti! Charles, Charles, kiel vi min trompis! Ĉu tio estas via indiforenteco, via malgrava interparolo!

S-RO HARDCASTLE Kie estas via malhumileco, — via ceremonia intervidiĝo? — Kion vi nun povas diri?

MARLOW Ke mi estas tute miregigita! Kio do signifas tio?

S-RO HARDCASTLE Tio signifas, ke vi laŭvole povas jesi kaj peti ion ajn, — ke vi povas kun la fraŭlino aparte paroli, kaj tion nei publike, — ke vi unu historion havas por ni, sed alian por mia filino.

MARLOW Filino! Tiu ĉi fraŭlino, via filino?

S-RO HARDCASTLE Jes, sinjoro, mia sola filino, mia Kotinjo. Kies filino ŝi estus do?

MARLOW Ho! . . .

F-INO HARDCASTLE Jes, sinjoro, tiu sama granda strabulino, kiun vi tiel ŝatis mallaŭdi apud mi! (*riverencas*) Ŝi, antaŭ kiu vi parolis kiel dolĉvoĉa, modesta, sentimentala gravulo, kaj ankaŭ kiel sentima, senzorga, agrabla Kraketil, el la sinjorina klubo . . . ha! ha! ha!

MARLOW Dio bona! Neniu povus elteni tian teruraĵon! Ĝi estas pli kruela ol morto.

F-INO HARDCASTLE Nu, do, kiun el viaj roloj vi elektos, por ke ni konvene parolu kun vi? Ĉu tiun de balbutulo malsupren rigardanta, kiu nur mallaŭte parolas, kaj nur sufiĉe por esti aŭdata, — kiu malamas hipokritecon; — aŭ ĉu tiun de laŭtvoĉa memfidemulo, kiu ĝis la tria matene . . . en noktkunvenoj restadas, kune kun sinjorino Virkaptil, kaj la maljuna Bridget Kapriol, ha! ha! ha!

- MARLOW Ho mia bruigata kapo! Se mi iam intencis petoliĝi . . . ke tiel oni min mokas nun! — Mi devas tuj foriri.
- S-RO HARDCASTLE Je la mano de mia korpo, vi ne tion faros! Mi vidas, ke en tute la afero estis la eraro, kaj mi ĝojas pro tio! Vi ne foriros, mi ripe-tas. Mi bone scias, ke ŝi tuj vin pardonos. Ĉu vi ne lin pardonos, Kotinjo? Ni ĉiuj vin pardonas. Kuraĝu, junulo!
(fraŭlino Hardcastle kaj Marlow eliras al la postscenejo; dume ŝi daŭrigas inciteti lin)
(venas sinjorino Hardcastle kaj Tony)
- S-INO HARDCASTLE Nu, nu, ili estas foririntaj! Ili foriru! Mi tute ne zorgas pri ili!
- S-RO HARDCASTLE Foririntaj? Kiuj?
- S-INO HARDCASTLE Mia obeema nevino kaj ŝia adoranto, sin-joro Hastings el la urbo, kiu venis tien ĉi kune kun nia ĉi tiea modesta vizitanto.
- SIR CHARLES Kiu? Honesta Georgo Hastings? Pli indan kamaradon mi neniam konis. La knabino ne povus fari pli bonan elekton!
- S-RO HARDCASTLE Je la mano de mia korpo, mi tial fieriĝas pro la unuiĝo.
- S-INO HARDCASTLE Nu, se li forkuris kun la junulino, li certe ne kunprenis ŝian doton; tio restos por konsoli la familion pro ŝia forlaso.

S-RO HARDCASTLE Dorothy, vi certe ne fariĝos tiel monavida!

S-INO HARDCASTLE Ha! tio estas mia persona afero, ne via.

S-RO HARDCASTLE Sed vi bone scias, ke tuj kiam via filo estos plenaĝa, se li rifuzos edziĝi kun sia kuzino, vi devos redoni al ŝi la tutan doton.

S-INO HARDCASTLE Jes, sed li ne estas plenaĝa, kaj eĉ ŝi ne konsideris, ke estus dece atendi ĝis lia rifuzo.

(venas Hastings kaj fraŭlino Neville)

S-INO HARDCASTLE *(flanken)* Kion! Jam revenintaj! Mi tute ne ŝatas tian rapidecon.

HASTINGS *(al sinjoro Hardcastle)* Estis mia nuna konfuzo taŭga puno pro mia intenco forkuri kun via nevino. Nun ni revenas por alvoki de via justeco al via humaneco. Kun la konsento de ŝia patro mi prezentis al ŝi amoferon, kaj nia reciproka korsento, de ĝia komenco ĝis nun, kun agrabla devo interplektiĝis.

F-INO NEVILLE Post la morto de mia patro oni tute devigis min kaŝeme agi por eviti subpremiĝon. En bedaŭrinda horo mi preskaŭ decidis forlasi mian doton por atingi mian elektitan celon; sed mi nun elreviĝas de mia iluzio, kaj atendas de via amemo tion, kion al mi rifuzas pli proksima parenco.

S-INO HARDCASTLE Sensenca bagatelo! Vi lernis tion el iu ploriga moderna romano.

S-RO HARDCASTLE Estu, kio povas esti: tre ĝojigas min vidi, ke ili revenas por demandi tion, kio rajte apartenas al ili. Venu tien ĉi, Tony. Ĉu vi, junulo, rifuzas edziĝi kun tiu ĉi fraŭlino, kiun mi nun prezentas al vi?

TONY Mia rifuzo taŭgus por nenio. Vi bone scias, patro, ke mi ne povas ŝin rifuzi antaŭ ol mi estos plenaĝa.

S-RO HARDCASTLE Nu, dume mi pensis, ke kaŝi vian rajtan agon eble estus rimedo por vin plibonigi, mi konsentis, kun la deziro de via patrino, tion daŭrigi iom pli longe. Sed, ĉar mi nun vidas, ke ŝi malprave agas en la afero, mi nun devas atesti, ke vi estas plenaĝa jam de tri monatoj.

TONY Ĉu mi estas plenaĝa, patro, plenaĝa!

S-RO HARDCASTLE Jes, jam de tri monatoj.

TONY Nu! vi tuj vidus kiel mi uzos mian liberecon. *(li prenas la manon de fraŭlino Neville)* Atestu ĉiuj homoj ke, per tiuj ĉi vortoj, mi Anthony Lumpkin, kavaliro de Blanketloko, rifuzas vin, Constance Neville, fraŭlino, el neniu loko ajn, kiel mian veran kaj rajtan edzinon. Tial, Constance Neville

povas edziniĝi kun kiu ajn ŝi volos, kaj Tony Lumpkin ree fariĝas si mem.

SIR CHARLES Ho! brava kavaliro!

HASTINGS Ho! inda amiko mia!

S-INO HARDCASTLE Ho! malobeas ido mia!

MARLOW Ĝojon! kara George! Sincere mi deziras al vi ĝojon! Kaj se mi povus igi tiun ĉi mian tiranineton esti iom malpli memvola, mi certe estus la plej feliĉa el la homoj akceptante similan bondeziron de vi.

HASTINGS *(al fraŭlino Hardcastle)* Nu, fraŭlino, fine alvenas la lasta sceno de viaj elturniĝoj! — Mi scias, ke vi lin ŝatas, kaj certigas, ke li vin amas, kaj nepre vi devas havi, kaj havos lin.

S-RO HARDCASTLE *(kunigante iliajn manojn)* Kaj mi ankaŭ jesas tion. Kaj, sinjoro Marlow, se ŝi fariĝos same bona kiel edzino kiel ŝi ĉiam estis kiel filino, mi ne kredas, ke vi iam pentos pri la kontrakto. Nun! al la noktomanĝo! Morgaŭ ni kolektos ĉiujn la malriĉajn paroĥanojn, kaj kronos la erarojn de la nokto per gaja matenfesto. Prenu ŝin, karulo, kaj, ĉar vi eraris pri la amatino, mi tre kore deziras, ke vi neniam eraru pri la edzino.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-194-1